E HUNGARA VIVO

MEGYEI KÖNYVTÁR
SZOLNOK

4

1969

8,—Ft

»TECHNOIMPEX«

HUNGARA MAŜININDUSTRIA ENTREPRENO POR INTERNACIA KOMERCO

EKSPORTAS:

ilmaŝinojn
kablomaŝinojn

maŝinojn de telekomunika tekniko
maŝinojn por plastaĵoj



PETU DETALAJN PROSPEKTOJN PRI NIAJ FABRIKAĴOJ

Budapest, V. Dorottya u. 6. – Budapest 62. P. O. B. 183 Telefono: 184–950
180–830 Telegramo: Technoimpex Budapest 994, 995, 617

HUNGARA VIVO

Kvaronjara revuo de Hungara

Esperanto-Asocio

Budapest VIII., Kenyérmező utca 6.

☆

1969, IX-a jaro, 4-a numero

Nia forumo — Diskuto 1
Anna Németh: Nobel-premia Esperanto 2
Novaj talentoj — Attila Hlavaty, Jozefo Horvath 3
Panoramo 4
Mihály Gergely: Soleca telefonulo 6
Lajos Tárkony: Revuo de revuoj 8
D-ro Jozefo Mátéffy: Rememoro pri la 54-a UK en Helsinki 9
D-ro Jenő Reisinger: Nia ekslibris-arto. Tr: *Ujlaky Nagy* 10
D-ro József Bognár—Gábor Vigh: Reformo de la hungara ekonomio 11
L. Kökény: 101 teknikaj novajoj de geedza paro 12
Nur por virinoj 14
Gábor Vigh: Niaj zorgoj Hungarlandaj 15
Lajos Tárkony: Poemoj 16
M. Gergely: Endre Szász 16
Sándor Szathmári: Donna Juana 18
Valéria Szabó: Hungaraj popolkutimoj 20
Lajos Lesznai: Kongreso de junaj muzikamantoj 22
László Nagy: Himno en ĉiuj tempoj. Tr: K. Kalocsay 24
Margit Szécsi: La ekflorintaj manoj. Tr: K. Kalocsay 25
Erika László: Esperanto kiel peranto en kulturaj interrilatoj 25
K. Kalocsay: Noto por la legantoj 25
József Szekeres: Vojaĝo en Italio 26
Ervin Fenyvesi: Turismo 26
Paŭlo Balkányi: Vivi kiel esperantisto 27
E. Fenyvesi, Gabriella G. Nagy: Recenzo ... 28
Babela humoro 29
La Esperanta Internacia orkestro 29
La ritmo de nia vivo 29
Leterkesto, ... 30
Glosaro, El la 1-a numero 31
Krucenigmo 32
Szlanka Tamás: La 2a Apud-Danuba Folklora Dancfestivalo 32
Zsolt Gyarmathy: Nova vojo por la junigo de Esperantujo 32

Sur la kovrilpago: Endre Szász — Madono

Ĉefredaktoro: *Mihály Gergely*

Responda redaktoro: *d-ro Jozefo Mátéffy*

Lingva revizio: *K. Kalocsay*

Arta redaktoro: *Jozefo Szekeres*

Redaktoraro:

d-ro Pál Avar, d-ro István Bácskai, Szilárd Bálint, Imre Botos, Ervin Fenyvesi, Lajos Lesznai, Alfonso Pechan, Aurél Ponori Thewrewk, Valéria Szabó, d-ro István Szerdahelyi, Tibor Ujlaky-Nagy Gabor Vigh

Ĉefkunlaborantoj:

D-ro Géza Bárczi, Paŭlo Balkányi, Károly Jobbágy, Mór Korach, Ludoviko Kökény, Sándor Szathmári, Lajos Tárkony

La redakta komitato la unuan kaj trian jaŭdon de ĉiu monato posttag ieze de la tria gis la sesa horo havas akceptotagon. (Bp. VIII., Kenyérmező utca 6.)

Eldonas: „Népszava" Gazeteldona Entrepreno, Budapest, VII., Rákóczi út 54. Telefono: 224—819

Responda eldonisto: Márton Gábor direktoro Disvastigas la Hungara Poŝto Abonebla en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K. H. I., Budapest, V., József nádor tér 1.) senpere, aŭ per ĉekenpagilo, por individuaj abonantoj la ĉeknumero estas 61 280, por neindividuaj 61 066.

La abono estas por jaro Ft 32.-, al eksterlando krome Ft 6.40 poŝtelspezo.

69 67816 Akadémiai Nyomda, Budapest
Responda gvidanto: György Bernát
Indexszám: 25.377

NIA FORUMO

DISKUTO

PRI JULIO BAGHY—MITOJ KAJ REALO DE V. BENCZIK.

Pli grandan komplimenton oni ne povas fari al aŭtoro, ol trakti serioze liajn verkojn. Kun sento de la plej profunda ĝojo kaj admiro mi legis la studon de Vilmos Benczik pri Julio Baghy; ĝi estas en nia lingvo preskaŭ unika — tiel ĝisfunda, tiel objektiva. Sen ia dubo, Baghy meritis tion, ke oni rigardu rekte kaj ne oblikve lin, ke oni kun amo komencu la taksadon, jam nepre necesan, de liaj realaj atingoj, de lia reala kontribuo al tiu esperantista kulturo, kiun li tiom amis, kaj al kiu li sin donis. Kiu estas amata, tiu ne bezonas la pietaton de senpripensa respekto; kiu estas amata, tiu rajtas atendi, ke la amantoj traktos lin sincere; kaj neniu en la movado, post Zamnhof, estis tiel amata, kiel Julio Baghy. Mi mem nur unu fojon renkontis lin senpere, sed de tiu renkontiĝo mi forportis la plej sentimentajn memorojn. Se nun mi asertas, kun Benczik, ke apud la grandaj fortoj de la Baghy-verkaro staras ankaŭ malfortoj, ĉu tio signifas, ke mi lin ne amas, ke mi lin ne respektas? Kia stultaĵo!

Julio Baghy tre forte pensigas pri la angla romanisto Charles Dickens: la sama etburĝa, nestabila origino, la sama dramemo kaj aktoremo, la sama sendisciplina troigo kaj melodrameco, la samaj karikaturaj rolantoj, la sama malpreciza, needukita, sed profunda kompato al la malriĉuloj — kaj la sama populareco kaj amo ĉe la publiko. Ambaŭ aŭtoroj estas facile renverseblaj per la objektiva kritiko — kaj la verkojn de ambaŭ aŭtoroj oni legas kun plezuro malgraŭ la kritikaj rezervetoj. Oni ne servas al aŭtoro, pretekstante, ke lia verkaro ne estas tia, kia ĝi kontroleble estas. Oni ne servas al la homo, farante el li netuŝeblan sanktulon. En mia lando oni honorigas la heroojn, pentrante ties portreton »ankaŭ kun la verukoj«, kiel ni diras. La portreto de Benczik pri Baghy estas tiom pli vivsimila, ĉar li ne forŝminkis la verukojn.

Baghy estis fenomeno, kaj la fenomenojn oni nepre deziras kompreni. Tamen ekzistas homoj, kiuj ne volas analizi fenomenojn, kiuj iĝis por ili karaj kaj eble sanktaj — sed kial? Ĉu ili timas, ke objektiva analizado komprencela iel atencos la fenomenecon de la koncernato? Ĉu ili timas, ke ilia ŝatata heroo montriĝos fantazia? Sed vere, se la granda reputacio de Baghy pruviĝus senbaza, ĉu tiu konstato ne estus avantaĝa por la movado? Per mensogoj oni ja ne konvinkas. Kaj neniu ĝis nun — certe ne Benczik — venis eĉ ĝis ombro de tia konstato. Li konkludis: »Baghy ne estis mondliteratura giganto: eĉ en nia literaturo troviĝas ne malmultaj, kies talento superas lian. Tamen, lia rolo en nia literaturhistorio estas unika: multe pli grava, ol la abstrakta analizo de la estetikaj kvalitoj de liaj verkoj supozigus.« Ĉu tio ne estas tute evidente vera? Se la studo de Benczik havas punkton malfortan, ĝi povas esti nur tio, ke li eble ne dediĉis sufiĉe da atento al du facetoj de la Baghy-talento, kiuj, same kiel aliaj, tendencas nuligi liajn mankojn; mi aludas al la streĉa kaptemo de liaj temoj kaj al lia volupta lingvouzo, kiuj ambaŭ (kiel ĉe Dickens) transsaltigas la leganton trans la plej absurdajn okazaĵojn. Oni trovas ke, kiel ajn sentimentalaĉa, kiel ajn neverŝajna estas iu okazaĵo en liaj rakontoj, la nura scivolo-pri-kio-sekvos katenas la atenton kaj ne lasas demeti la libron. Sed estus absurde pretendi, ke Sur sanga tero *kaj* Printempo en la aŭtuno *estas romanoj estetike aŭ mondliteraturе samnivelaj, aŭ ke la poemoj en* La vagabondo kantas *estas same valoraj kiel la poemoj en* Pilgrimo. *Kiu aliras al Baghy sen distingaj kriterioj, kaj ĉion laŭdas nur ĉar la aŭtoro estis aminda homo, tiu estas analfabeto kaj vivas per mitoj. Baghy estas ĉirkaŭata de mitoj; kiel skribis John Francis (Norda Prismo, 1/1968 p. 5): » . . . iuj liaj amasaj legantoj eĉ legis liajn verkojn, sed nur unu flanko de lia verkista personeco trafis ilin. Tio estas la flanko priskribita al ili de la publika voĉo, antaŭ ol*

NOBEL-PREMIA ESPERANTO

(En la organo de la hungaraj pedagogoj, en la numero de la 22a de aŭgusto de »Köznevelés« *[ĝenerala edukado] ni legis artikolon kun la supra titolo. Pro ĝia signifo kun ĝojo ni publikigas la pli gravajn alineojn de la artikolo.)*

Por la ĉi-jara Nobel-Pacpremio la sveda Scienca Akademio rekomendis la Universalan Esperanto-Asocion pro ties meritoj en la akcelado de la interkompreno inter la popoloj kaj nacioj. La sciigo aldonas krome, ke la Asocio, kun sidejo en Roterdamo, havas membrojn en 85 landoj.

Kiu en infanaĝo aŭ poste lernas Esperanton, pli facile lernas ankaŭ aliajn lingvojn. Pro la lingva senparenceco ni hungaroj estas en malavantaĝa pozicio. Ni devus do pli efike fruktuzi la eblecon!

15 milionoj da homoj parolas la Esperantan lingvon, 15 milionoj da homoj esperas povi igi daŭra la pacon. Ili kredas, ke ne la haŭtkoloro, nek la disvastiĝinteco de ilia lingvo donas rangon al la homo en la mondo, sed ilia altiĝinta pensmaniero, kiu kun bonvola intereso laboras kune kun kiu ajn homfrato por la bona celo. Ne estas hazardo, ke la malgrandaj popoloj gvidas Esperanton al la sukceso. El morala vidpunkto nur tia lingvo povas pretendi la nomon lingvo internacia, kiu estas la propraĵo de neniu popolo. Estas ja memkomprenebla, ke tiu popolo, kies lingvon oni elektas internacia lingvo, baldaŭ superos la ceterajn.

Kun la evoluo de la tekniko konstante ni proksimiĝas unu al la alia, sed ĝuste sekve de la evoluo minacas nin ankaŭ la danĝero de la milito. Nur ununura solvo ekzistas: la spirito de la komprenemo. Evidente, ke pro la ĉidirektaj laboradoj, sukcesaj fortostreĉoj atingis nun la planata altnivela rekono la Universalan Esperanto-Asocion. Kore ni deziras ankaŭ ĝian realiĝon.

Anna Németh

ili mem entreprenis legadon, kaj tio estas ankaŭ la flanko kiun, leginte, ili priskribos al nova generacio de novicoj«. Tiel la mitoj eterniĝas. Sed Baghy estis tro home homa homo por meriti enterigon sub mita arkano: granda estas la merito de Benczik, ke lia studo staras kiel monumento al la homo Baghy, kiu estis ankaŭ la aŭtoro Baghy.

Plej grandan servon al la mortinta verkisto faris la hungara esperantistaro per taŭga reeldono de lia kompleta verkaro, aŭ, manke de tio, de minimume liaj plej geniaj verkoj. Certe Baghy mem preferus, ke liaj libroj estu daŭre legataj, ol ke oni enniĉigus lin kiel sanktan ikonon. Malpravas ne nur tiuj transdonantoj de mitoj: malpravas ankaŭ tiuj, kiuj flustre disvastigis pri lia senvaloreco. Ni honoru nian heroon ankaŭ kun liaj — cetere ne malbeligaj — verukoj.

W. Auld.

*

JULIO BAGHY — En la kritiko de Vilmos Benczik pri Baghy mi ne konsentas tion, ke li motivas ĉiun agon, verkon, stilon per la etburĝa deveno de Baghy La klasoj ja havas siajn karakterizajn mondkonceptojn klasajn, kiujn diktas al ili la ekonomia intereso. Sed ĝi estas nur statistika fakto kaj ne koncernas *ĉiujn* personojn de la klaso. (Laŭ ĉi tiu vidpunkto ne povus esti socialistoj Marx, Engels kaj Lenin, nur Hitler kaj Mussolini, kiuj havis laboristan devenon.)

Aliloke V. Benczik asertas, ke la romano »Hura!« estas »lia dua, eble plej bona romano.«

Tiu romano estas el morala vidpunkto vere eminenta, sed beletristike lia plej malbona libro. Baghy estis revema naivulo, verva adepto de la homaranismo kaj humanismo kaj ĝuste el lia entuziasmo sekvis la iome primitiva ekzaltiĝo por la belaj fatamorganoj, kiuj plibeligas la grizan realon.

Por ilustri lian varman, humanan pensmanieron mi mencias nian lastan renkontiĝon en la oficejo de la Hungara Esperanto-Asocio: Li sin apogis al tablo kaj parolis arkaŭ tiam pri Esperanto kaj humanismo:

»Esperanto ne estas nura lingvo internacia. Ĝi estas la enkorpiĝo de la humanismo, kiu kristaliĝis en la animoj. Ĝi estas la plej serena manifestiĝo de la konscienco de la homaro.«

Ĝis nun mi rememoras lin tiel, apogiĝantan al la tablo, ĉar li jam estis malforta, sed lia humana animo estis forta kaj brila.

Sándor Szathmári

*

ĈU MITO? La esprimo »mito« surprizis, eĉ indignigis min. Por mi estas preskaŭ dube, ĉu la aŭtoro de la artikolo konas la difinon de la vorto »mito« laŭ Plena Vortaro.

Preskaŭ nekompreneble, sed almenaŭ strange estas elekti tian titolon konekse kun tia elstara individuo, kiu vivis ĉi tie inter ni kaj kies populareco estis preskaŭ sen ekzemplo.

Membro de la Akademio, la plej konata verkisto, poeto de Esperanto, ĝoje aŭskultita oratoro, tutmonde konata esperantisto, pri kies vivoverko, pri kies literaturaj meritoj oni povas, ankaŭ devas disputi, sed lian efektivan popularecon kvalifiki ĉu intence, ĉu sen tio — estas erarige. Mi citas nur kelkajn ekzemplojn: en 1959 en kadro de la jubilea kongreso en Varsovio la simpatio - esprimiĝo de miloj malfruigis lian alparolon. En Kopenhago la partoprenantoj de la 47-a U. K. de E. en 1962 kvazaŭ unu homo postulis la alparolon de Julio Baghy, alveninta kiel membro de la hungara delegacio, kaj nur post lia parolo kaj post la fervora ovacio oni provis transiri al la tagordo. Mi bone rememoras ankoraŭ al la efiko de lia parolo en la Universala Kongreso en Budapeŝto, kiu estis lia lasta rolado antaŭ granda amaso, sed mi supozas, ke mi ne devas daŭrigi. Mi nur mencias, ke la Internacia Esperanto Muzeo en Vieno aŭ la Universala Kongreso en Helsinki ne en signo de »mito« nomis unu el siaj plej grandaj kaj belaj salonoj pri Baghy.

La vivoverko kaj memoro de Julio Baghy ne bezonas defendon. Ties pritaksado flanke de kompetentuloj jam okazis en konvena formo kaj loko. La artikolo uzis la menciitan titolon pro nekompreneblaj motivoj. Oni ne nur povas, sed devas indulgi la memoron de Baghy de tio, ke hungara aŭtoro nomu »mito« tiun ĉi preskaŭ senekzemplan popularecon, de multaj enviitan, sed de kompetentuloj ĝis nun ne kontestitan.

La plej eminentaj literatoroj de Esperanto: Edmond Privat, Gaston Waringhien, Kálmán Kalocsay, William Auld kaj multaj aliaj jam ne unufoje skribis pri la signifo de Julio Baghy kaj signis lian indan lokon en la kulturo de Esperanto kaj samtempe ili rekonis lian preskaŭ mirindan popularecon.

D-ro István Bácskai

(Pri »RENOVIĜI«. — Koncerne la artikolon de M. Gergely kun la supra titolo, la redakcio estis superŝutita per alparoloj. Kiel ajn granda ĝojo estas por ni ĉi tiu granda interesiĝo, tamen, bedaŭrinde, ekzistas spaco dediĉebla al tiu ĉi temo, kiun ni ne povas transpaŝi kaj tial ni estis devigitaj mallongigi la artikolojn, ekstraktante nur ilian esencon. — *Redakcio*).

*

UTILIGI LA LINGVOSCION — Sendube oni devas konsenti kun la pensoj de Mihály Gergely en la gvidartikolo RENOVIĜI: konsidere de la rapidegaj modifoj en nia nuntempa mondo, ankaŭ la movado devas sin modifi plursence. La movadajn energion kaj eblaĵojn multe pli dinamike ni devas koncentri al la uz-eblecoj: Vi, estonta (kaj estanta) esperantisto povos diversflanke l e g i, l e r n i, s t u d i, v o j a ĝ i kaj internacie renkonti! Indas lerni por tio la Internacian Lingvon! — kaj por tiu »memkomprenebla« slogano nia movado v e r e devas ĉion, sed absolute ĉion fari, organizi, l a b o r i, strebi por malfermi pli kaj pli da uz-eblaĵoj. Vastaj horizontoj malfermiĝis jam nun per la egaj sukcesoj de kelkaj vojaĝ-organizadoj, per renkontoj internaciaj ekzemple en Hungarujo ĉi-somere, precipe, se oni sukcesas rompi la izolitecon, per fakuloj, artistoj k. a. La kuraĝaj »entreprenoj« multe sukcesis, jen estas ankaŭ vojo malfermi kaj larĝigi la horizonton ankaŭ per internaciaj fakaj renkontoj. Laŭ mia opinio, unue malgrandaj internaciaj fakaj asocioj, ligoj kapablos aprobi Esperanton, por faciligi sian agadon, kunvenon. Sukcesi ĉe ili ŝajnas ofte nur afero de persona influo kaj ekstera helpo — la sukcesoj rapide altiros aliajn asociojn. Por la kunvenantoj do ŝajnos inda lerni la lingvon. Tiel leviĝos la respekto al Esperanto — kune kun la praktika uzado.

Ervin Fenyvesi

*

La artikolo M. Gergely enhavas la plej aktualajn por nuntempo opiniojn kaj necesas ĉie realigi ilin el la vivo. Tre vere, nia E-vivo ŝlosis sin inter kvar muroj de E-kolektivoj kaj ni al neniu montras, kion ni kapablas. Ni okupiĝas pri E-movado nur por ni mem, al aliaj homoj ni ne kuraĝas pri tio. Mi aprobas la opinion de s-ano Gergely, ke ni devas niajn ideojn pli vaste konatigi al neesperantistoj. Por tio estas tre multaj ebloj . . .

Ni mem, esperantistoj, devas multe pli estimi nian lingvon. Estas malefika, mallaŭdinda kutimo ĉe ni paroli la lingvon NUR dum la kunvenoj. Sed sen tiu »morala devigo« ni ne uzas ĝin. Renkontante ie, oni tre malofte parolas en Esperanto — en la nacia lingvo estas ja pli simple! Ofte eĉ dum E-kunvenoj ni parolas en nacia lingvo. Pro tio nia lingvo ne evoluas, ĝi ne havas necesan praktikon per ni mem. Eĉ dum la UK en Helsinki mi aŭdis tro ofte la parolojn en naciaj lingvoj inter bonaj esperantistoj . . . La homa malvigleco nin ankoraŭ superregas. Unue ni mem devas esti bonaj lingvokonantoj, por pruvi al aliaj la kvalitojn de la lingvo. Sen kuraĝa uzado ĝi restos eterna »hobio« kaj ne havos estimon. Mi alvokus ĉiujn esperantistojn uzi la lingvon. ĈIE, kuraĝe, bone, kaj ankaŭ en ĉeesto de fanatikaj kontrauŭloj. Esperanto valoras tion. Sed ni mem devas esti valoraj uzantoj!

Johannes Palu, Tallinn.

NOVAJ TALENTOJ

ATTILA HLAVATY:

DE TAG' AL TAG'

Vivas mi
de tag' al tag',
iras mi
de vag' al vag',
ridas mi
de pag' al pag'.

Legas mi
de cit' al cit',
revas mi
de lit' al lit',
kredas mi
de pit' al pit'.

Rolas mi
de psalm' al psalm',
molas mi
de varm' al varm',
ploras mi
de larm' al larm'.

INFANECA SENTO

Eĉ vi jam ne povas esti
vera in' por mia mem',
ne sufiĉas vin malvesti,
kiel agro antaŭ sem'.

Viasfere min plu teni
senlogiĝis korpa nud',
amon por vi arlekeni
estus senhonesta lud'.

Plena fremdo intelekta,
al la naŭzo vojo rekta,
eĉ ne sento, nur volupt'.

Infaneca sento hantas,
virton virgan kredi kantas
pura, poranima nupt'.

JOZEFO HORVÁTH

DEZIRO

Se mi rigardas al ĉiel'
kaj zum' konata trazigzagas,
mi sentas guston de miel'
kaj min fluganta mi imagas.

RENKONTIĜONTE

Mi prepariĝas al renkonto,
formiĝas en la fantazi',
Kara, pri vi magia sento
kaj ĉi naiva melodi'.

PARAŜUTA SALTO

Jam vidiĝas la cel',
sube sur la ter' ĝi brilas
kiel en sunradio la miel'.
Ĉe la pordo mi staras kaj vidas
la unuan malaperi antaŭ mi,
kaj sekvos jam tuj ankaŭ mi!
Ekfrapas min la vento,
bluas ĉiel', kirliĝas la aero jam
strange kiel la sento
de la unua am'.

PANORAMO

En la nova lernojaro preskaŭ dumil hungaraj studentoj komencis siajn studojn en la altlernejoj kaj universitatoj de la socialismaj landoj. La plej multaj — 320 el ili — lernas en Sovetunio, la ceteraj en Pollando, en la Germana Demokrata Respubliko, en Ĉeĥoslovakio, Rumanio kaj Bulgario.

*

La Medikamentokomerca Entrepreno MEDIMPEX aranĝis en Kievo la tagon de la hungaraj medikamentoj. Poste en Jalto venis la vico al la renkonto de la hungaraj kaj sovetaj kuracistoj kaj medikament-industriaj fakuloj. Sovetunio estas la plej granda aĉetanto de la hungaraj medikamentoj: MEDIMPEX liveras medikamenton al Sovetunio en valoro de jare 50—55 milionoj da rubloj.

*

Rezulte de la intertraktadoj de hungara eksterakomerca delegacio nia eksport-importa vartrafiko kun la Nordafrikaj landoj — unuavice kun Alĝerio kaj Tunizio — estas duobligebla dum du jaroj.

*

D-ro Lukas Hoffman, membro kaj reprezentanto de la Germana Federacia Respubliko en la Tutmonda Naturrezerva Fondaĵo kaj de tiu de la Internacia Naturrezerva Unio studis surloke la faŭnon kaj flaŭron de la hungara stepo Hortobágy (hortobadj). Raportante pri siaj spertoj li diris: Hortobágy estas unika en Eŭropo. Precipe kurioza estas la mozaika alterno de pramarĉo kaj soda grundo, kaj samgrade ankaŭ ties planta kaj besta mondoj. Hortobágy estas granda trezoro de Hungarlando, kaj oni devas gardi ĝian flaŭron kaj faŭnon. Li deklaris: li rekomendos, ke la Unio disponigu sciencan kaj praktikan helpon por la evoluigo de Hortobágy en nacian parkon.

*

La Internacia Fotoarta Federacio (FIAP) distingis 22 hungarajn fotoartistojn per priarta premio. FIAP donacis al P. F. Angelo, Kálmán Szőllőssy kaj d-ro Zoltán Tildy sian plej altan distingaĵon, la tn. »Honoration Efiap« (Honorigon Efiap), per kiu oni premiis la tutan vivoverkon de la artistoj.

*

La trian fojon ricevis la *premion Rizzoli* la hungara varpropaganda gazeto »A+F«, aperanta en la komuna eldono de la entreprenoj Artex kaj Ferunion. Per la ĉi-jara premio »Arĝenta presilo« oni premiis la koloran vitro-industrian anoncon aperintan en la gazeto. La anoncon oni elektis el 3.300 reklamoj.

*

Kun la partopreno de ducent teatraj fakuloj, reĝisoroj kaj direktoroj el tridek kvin landoj oni aranĝis en Budapeŝto la 13-an kongreson de ITI, la mondfederacio de la teatroj.

*

En septembro oni aranĝis internacian arthistorian kongreson en Budapeŝto kaj je tiu okazo en pluraj ekspozicioj oni prezentis la plej signifajn rezultojn de la hungara arto. Inter ili elstaris per sia riĉeco la ekspozicio de ceramikaĵoj en la Nacia Galerio.

*

PAĈJO VINTRO ALVENIS!

Duafoje alvenas Paĉjo Vintro dum la kristnaskaj festotagoj. Krom la hejmaj ĝojigaj okazaĵoj, ĉ. 5 mil pioniroj povas partopreni la maskobalon en la Parlamento, kiel gastoj de la Hungara Pionira Asocio. Kompreneble, la kondiĉo de la invito estas la eminenteco en la lernejo.

FELIĈAN NOVAN JARON!

Kia ajn estis la forpasinta jaro — miksita per bono-malbono, adiaŭ al ĝi! Oni esperas ĉiam pli bonan¸. . .do, helpu ankaŭ ni mem al la ŝatata nova jaro, ke ĝi povu esti ĝojiga:

Kiu en la unua minuto de la jaro ektiras la voston de porkido, certe tiu estos tre feliĉa!

En la nokto de Silvestro ĉio estas permesata! Ĉe la strata jubilado oni rajtas ankaŭ trumpeti en la orelon de sinjoro policisto.

Malnova sperto: la kamenpurigisto alportas sukceson, feliĉon. Do, la bonulo, kiu jam ne bezonas sian nigran kostumon en la moderna metropolo — en la nokto de Silvestro surmetas ĝin por ĝojigi la ĉarmulinojn. La danko — lin ĝojigas, eble.

BUÉK! — Boldog Új Évet Kívánunk!

Feliĉan novan jaron ni deziras — por ĉiuj karaj legantoj!

Ni restu reciproke bonaj amikoj ankaŭ en la estonto — HV-legantoj kaj HV-redaktoroj —, ni helpu komune la amikecon inter la popoloj, en la ideo de Esperanto, por la evoluo de nia ŝatata movado!

Elkore deziras tion

HUNGARA VIVO

MIHÁLY GERGELY

SOLECA TELEFONULO



Naskiĝis en la jaro 1921. en Nord-Hungarlanda minvilaĝo. Li estis ferindustria faklaboristo, soldato, fabrika oficisto, teknika ĉefo, redaktoro de ĵurnalo, literatura kontrolisto en la Hungara Radio, sekretario en la Asocio de Hungaraj Verkistoj. Depost 1957 li subtenas sin el verkista kaj ĵurnalista laboro, kunlaboranto de la Budapeŝta »Hungara Nacio« (tagĵurnalo de Patriota Popolfronto). Ĝis nun aperis de li dektri volumoj, romanoj, noveloj, riportoj kaj sociografiaj verkoj. Por lia kreaĵo oni lin honoris per la literatura premio Attila József.

De tagoj eĉ unu uzebla penso ne venis al li en la kapon, eĉ unu frazon li ne sciis verki, kvankam lin ege premis la limdato de eseo-volumo. Li legadis, atendante Marta-n, de kiu li esperis horojn trankviligajn kaj ankaŭ refortigajn. Esperis, jes, sed pli kaj pli malcerte; de monatoj li vidis pli kaj pli klare, ke ilia okjara amrilato jam finiĝadas. Nepre sentis kaj volis tion Marta, la fragila virino de tiel aparta beleco, kiu, apud sia edzo kaj du infanoj, apartenis ĝustadire sole al li. Li vivis sola. Post la unuaj rendevuoj li petis Martan pri eksedziniĝo kaj ke ŝi estu lia edzino Multfoje li ripetis la peton, sed Marta ĉiam negis, neniam dirante kial.

Marta estis ĉiam akurata, kaj nun jam pasis la kutima kvina horo. Eĉ en la torporo, ĉiam pli reganta lian korpon kaj cerbon, liaj nervoj jam kvazaŭ ektintis pro la streĉo.

En la ĉambro estis agrabla varmo, ĉar li amis la varmon. Ne tiom korpe li suferis pro la malvarmo, kiom interne li frostetis, kaj tio ĉiam paralizis lin en la laboro. Li iris al la fenestro, atentis gvate la kontraŭflankan aŭtobus-haltejon. Unu post la alia pasis kvar aŭtobusoj, sed Marta ne venis. La horloĝo batis tri kvaronojn post la kvina. Almenaŭ ŝi telefonus!

Kaj nun eksonoris la telefono. Kun ekscita rapideco li levis la aŭdilon.

— Halo!

— Ĉu la Johan-hospitalo? — aŭdiĝis virvoĉo.

— Ne! Privata loĝejo.

— Pardonu, ĉu 154 030?

— Ne! Misa interkroĉo.

— Pardonon, sinjoro!

— Nenio okazis.

Li demetis la aŭdilon, sed apenaŭ li faris du paŝojn direkte al la fenestro, la telefono lin postkriis.

— Jen!

— Ĉu Aleĉjo? . . . Ha, terure malfacile mi ricevis kontakton, kaj . . .

— Pardonu, sinjorino, sed se vi deziras daŭrigi, vi devas scii, ke mi ne estas via Aleĉjo.

— Ĉu vere ne? Kun kiu do mi parolas?

— Ne kun Aleĉjo.

— Pardonu.

— Faras nenion.

Li turnis sin ree al la fenestro, sed la telefono denove tintegis.

— Jen!

— Ĉu la Akademio Zrinyi? — la voĉo estis de junulino.

— Ne.

— Do?

— Mi ne estas la Akademio Zrinyi.

— Tial oni ne devas malĝentili.

— Kiel do mi malĝentilis, filnjo?

La nekonatino senvorte forpasis el la linio.

Li rezignaciis, ekfumis, sidiĝis en fotelon ne malproksime de la kahelforno, apud la freneziĝinta telefono. Prenis en la manon literaturan revuon, sed la telefono tuj anonciĝis.

— Halo, Aleĉjo, ĉu estas vi ĉe la telefono?

— Bedaŭrinde, sinjorino, sed . . .

— Ho, denove vi!

— Kion fari? Jam la duan fojon okazas, ke freneziĝas mia telefono. Mia ĉirkaŭaĵo ŝajne estas malbona telefon-tereno. En tri minutoj vi estas la kvara, kiu estas alkroĉita erare.

— Kial vi ne anoncas tion al la centralo?

— Mi faris jam foje. Oni rekomendis atendi kelkajn horojn.

— Kion nun mi faru? Pro via freneza aparato elĉerpiĝis miaj telefon-moneroj.

— La centralo eraradas, ne mia aparato.

— Ankaŭ tiuokaze! Ho, vi! . . .

Li sciis, ke la difektiĝinta centralo lin ne lasos trankvila, sed hodiaŭ li devis resti ĉe la telefono. Anonci li intencis la difekton al la centralo, sed ia stranga inerteco lin detenis. Cetere, la telefono ne silentis eĉ minuton.

— Halo!

— Ĉu la loĝejo Lekencei?

— Tute ne.

— Do kiu?

— Ĉu ne estas tute egale por vi, sinjoro?

— Sed jes, kaj ankaŭ tio, se vin tuj trafos apopleksio! Idioto!

— Vere, vi estas de delikata sentimento. Dankegon.

— Krevu!

Li senresponde demetis la aŭdilon kaj atendis novan viktimon.

— Halo, ĉu Florprodukta Kooperativo Rozmareno?

— Ne! Kafejo Mortofloro.

— Ĉu? Ĉu do ne Koopo Rozmareno?

— Ne! Papilio-kaptejo Papavo.

— Kial vi arlekenas? Ĉu vi volas amuziĝi? Saĝega kapo!

. . .

— Halo! Ĉu nervsanatorio?

— Ankoraŭ ne!

— Kion signifas, ke ankoraŭ ne? . . . Mi volus paroli kun doktoro Varga, se li troviĝas tie.

— Mi diris, ne nervsanatorio.

— Kio do?

— Privata loĝejo.

— Kial vi ne komencis per tio? . . . Kelkaj havas multe da tempo!

. . . . .

— Laĉjo? Salut', karulo! Do mi povas al vi supreniri?

— Ĉu vi insistas pri Laĉjo?

— Halo! Kio do, ĉu mi insistas? Kiu estas tie?

— Iu, same atendanta iun; iun, kies voĉo estas ĝuste tiel agrabla kiel la via, sed . . .
— Kun kiu mi parolas?
— Mi bedaŭras, sed ne kun Laĉjo.
— Kial vi ne komencis per tio, ke vi prezentas vin?
— Ĝis nun mi kredis, ke tiu prezentas sin, kiu ien enpaŝas.
— Pereu, vi . . . abomena etiket-instruisto.
. . .
— Aleĉjo, ĉu estas vi?
— Ŝajne vi povis do aĉeti telefon-monerojn.
— Halo, kiu estas tie?
— Ne Aleĉjo.
— Ho, denove vi!
— Pardonu, sinjorino.
— Diru, vi, nevidebla monstro, ĉu vi amuzas vin per tio, ke vi sidas apud via aparato kaj ĝojas pri la misa alkroĉiĝo de sensuspektaj telefonuloj?
— Mi vere bedaŭras, ke vi disipis pro mi tri telefon-monerojn; ĉi-vespere mi ne povas eliri dehejme.
— Kaj kial ne? . . . Ĉu vin ne nervozigas la nekonataj telefonantoj?
— Ne ĉiu . . . Ekzemple vi tute ne. Mi plezuras pri tia velura, plensonora alda voĉo. Ĝi memorigas pri Elizabeta Komlósi.
— Flata komplimento, sed min ne konsolas.
— Mi scias.
— Diru, ĉu mi aŭdos ĉiam vin, se mi volas ĉi-vespere paroli kun Aleĉjo?
— Provu el alia telefonejo, eble vi estos pli sukcesa.
Pasis la sesa, li certiĝis, ke li vane atendas. Io malhelpas Martan, aŭ ŝi . . . simple ne volas veni. Ankaŭ nun tiu fortanima, decidema Marta faros la unuan paŝon, kiel ĉe ilia konatiĝo, pro kio li duoble estimis ŝin dekomence.
Li vokis la oficejon de Marta, sed de tie ŝi eliris je la kvara kaj duono, diris purigistino.
Al ŝia hejmo li ne povis telefoni: promeso ligis lin neniam tion fari, kio ajn okazus. Ankaŭ sian familion ŝi sciis gardi estiminde.
— Halo, Paŭĉjo? . . . Ve, mi estas tre afliktita ĉi-vespere. Ĉu vi scias, kio al mi okazis?
— Ne.
— Imagu, oni min envokis por kontrolo, kaj ŝajnas, ke oni trovis ion. Kiam mi hejmeniris, jam atendis tie la invitilo de la onkologio, oni vokas min por nova ekzameno . . . Dio mia, mi teruriĝis.
— Ne teruriĝu! Ĝustatempe malkovrita kancero estas kuracebla diversmaniere, per radiado, per operacio . . . En la mondo pli ol cent institutoj studas kaj serĉas la kurac-metodojn de la kancero. La hungara profesoro Szent-Györgyi, vivanta en Usono, eksperimentis . . .
— Halo! Paŭĉjo, de kiam vi interesiĝas tiom pri la kancer-esploradoj?
— Pri multo oni interesiĝas, pri kio oni ne parolas.
— Halo, Paŭĉjo! Ĉu estas vi? Hodiaŭ via voĉo estas tiel stranga! . . . Halo! Kun kiu mi parolas? Kial vi ne respondas?
— Mi ne estas Paŭĉjo, sed kion mi diris pri la kancero, tio estas vera. Vi ne devas teruriĝi. Eble necesas pli zorga ekzamenado . . .
— Ĉu vi diras, ke mi ne havas kanceron?
— Kaj eĉ se vi havus! Vi devas ja esti en komenca stadio, se ĝis nun vi rimarkis nenion. Kaj tial certe oni elkuracos vin.
— Ĉu vi estas doktoro?
— Ne, sed ĉiuj gazetartikoloj scias tiom pri la kancero.
— Mi petas pardonon pro la ĝeno . . . Kaj dankon por la trankviligaj vortoj. Bonan vesperon.
— Bonan vesperon, sinjorino.
. . .
— Halo, oĉjo Eŭgeno?
— Ne.
— Pardonu.
— Ne grave.
. . .
— Paŭĉjo?
— Ne, sinjorino.
— Ho, ne koleru.
— Mi ne koleras. Ĉi-vespere mi havas tempon.
— Sed se ni jam renkontiĝis nun denove, ĉu vi ne parolus al mi pri la nuntempaj kancer-esploradoj?
— Mi estus blufulo, se mi tion farus. Certe vi havas doktor-konaton, mi proponas, serĉu lin anstataŭ Paŭĉjo, li informos vin pli bone ol ni duope.
— Ĵus vi menciis la nomon de Szent-Györgyi. Ĉu estas li, kiu ricevis Nobel-premion pro siaj paprik-esploroj kaj elmigris al Usono?
— Ĉu vi scias ĉion ĉi el libroj?
— Ho, mi jam ne estas kokideto . . . Ĉu li vere esploras nun la kanceron?
— Kaj eĉ per tre interesa metodo kaj kun esperigaj rezultoj. Antaŭ nelonge publikigis la gazetoj lian deklaron. Ĉu vi ĝin ne legis?
— Ŝajne mi pretervidis. Kion do li deklaris?
— Li nomis skandala stulto, ke malgraŭ la belaj progresoj de la esplorado, la Usona registaro fortiris de lia instituto la provizan sumon bezonan por definitiva sukceso, kvankam ĝi estus malpli ol unutaga kosto de la Vjetnama milito.
— Terure! Dio mia, kiaj estas la homoj! Ve, mi devas fini, jam tri personoj atendas por telefoni. Kion do vi konsilas?
— Prenu trankviligilon, provu bone dormi, kaj morgaŭ iru al la kontrol-ekzameno. Ne timu!
— Dankon. Mi ĝojas, ke kun tia bonfarulo mi parolis.
. . .
— Halo! Oĉjo Eŭgeno?
— Oĉjo Eŭgeno hodiaŭ elmigris.
— Kion li faris? Kio okazis al oĉjo Eŭgeno?
— Mi diris: la oldulo iris translimen en angla maniero.
— Sepdekjarulo? . . . Kun kiu mi parolas? Ĉu onjo Maria estas hejme?
— Ankaŭ onjon Maria kunportis la maljuna sinjoro.
— Aĉe, misguste, vi, telefon-bandito! Kial vi ne diras tuj, ke la interkroĉo estas falsa? Tiajn oni devus eltiri el la trafiko, ke ili ne ronĝu la nervojn de la homo.
. . .
— Slut', Princo!
— Slut', Katinjo.
— Kio do, ĉu vi dume viriĝis? Via voĉo estas tiel malalta.
— Mi raŭkiĝis.
— Nu, ĉu vi venos en la espreson?
— Jes, certe.
— Mi atendos vin! Slut'!
— Slut'!
. . .
— Aleĉjo, ĉu estas vi?
— Jes.
— Ho, se vi scius, de kiam mi vin vokadas! Jam trifoje al ia malfeliĉulo min ligis la centralo. Ĉu vi scias, kio nova?
— Mi aŭskultas.
— Ĉu nur »mi aŭskultas«? Vi parolas nur tiel flegme, kiam ni jam interparolis, ke hodiaŭ mi metos klara la aferon kun mia edzo kaj poste tuj mi vokos vin.
— Mi scias, scias, daŭrigu. Kio estas?
— Imagu, Georgo konsentis la eksedziĝon. Dio mia fine mi estas libera, kaj de nun sole kaj vere, tute kaj ĝismorte la via. Espereble ankaŭ Katerina konsentis eksedziniĝi. Vi vidos, kiel belegajn infanojn ni havos! Fine ni havos infanon! Ĉu vi komprenas? . . . Halo! Kial vi ne respondas? . . . Halo! Aleĉjo, kial vi mutas? Diru jam ion, je la amo de Dio! Aŭ ne estas vi? Halo! Ĉu vi estas tiu? Denove vi? . . .
Li ekhontas, rompas la interkroĉon, demetas la aŭdilon sur la tablon, ekfumas, iradas tien-reen: li estis tro bombardata per hazardaj dialogoj. Poste li iras al la fenestro. Malvarma novembra vespero. Nebulo. Eĉ unu aŭtobuso el la alvenantaj ne alportas Martan. Li paŝadas al la forno, sin apogas dorse al la varmegaj kaheloj de la forno, tamen frostotremetas. De nun — li pensas — se Marta ne venos plu, li havos multfoje tiajn solecajn vesperojn, ĉar viro en tia aĝo, ĉe la sojlo de la kvindekaj jaroj, havante iom da memkritiko, devas rekoni, ke li malfacile jam trovos tian virinon kiel Marta.

Lajos TÁRKONY

REVUO DE REVUOJ

Iom kortuŝite mi komencas ĉi tiun rubrikon, rememorante pri la tempoj, kiam la saman Revuon mi verkadis por Literatura Mondo kaj por Lingvo Libro. Ĉi lasta — eble ne estas superflue tion klarigi al la nuntempuloj — estis gazeto speciale por recenzoj. Kiaj tempoj ! Jes, ĉar en la nuntempa Esperantujo la recenzoj pli kaj pli ŝrumpas kaj la malfeliĉa aŭtoro de libro iom post iom devas aĉeti mikroskopon, volante ion legi pri sia laboro.

Unue mi okupiĝu pri la ĉi-jara unua numero de NORDA PRISMO. Jam anticipe mi diru, ke mi trovos nur vortojn de laŭdo: ĉi tiu numero ĉiel estas inda al la karmemora Szilágyi, en ĝi estas konservataj ankaŭ la specialaj interesaj rubrikoj: »Tra nia prismo«, »Facila vento«, »Socia spegulo«. Sed krom tiuj komuninteresaj artikoloj ankaŭ la literaturo ne estas neglektata kaj kun speciala ĝojo mi notis la nomon de *Leppäkoski*, kiu, la granda tradukinto de KALEVALA, nun eminentas per interpreto de modernaj poetoj. Kiel hungaro, mi kompreneble estis tre interesata de la artikolo de *V. Setälä* pri »La Tragedio de l'Homo« kaj pri ties analogaĵo de *Linnankoski*; estas ĉagrene, ke mi ne povas pri ĝi okupiĝi pli vaste. Sed jen la tri fabloj de *Lafontaine* en la traduko de *G. Waringhien*, — oni povas nur ŝmaci pro legoĝojo. Kaj jam krias por esti menciataj la originalaj poemoj de *Mira Andrusievicz* kaj kun plezura animtiklo mi konjektas, ke en ŝi anoncas sin nova stelo sur nia ĉielo; ŝi kontribuis ankaŭ per interesa prozaĵo. *Hilda Dresen* ankaŭ ĉi-numere montras sian inspiratan diligenton per du poemtradukoj el la estona. *W. Auld* plezurigas nin per du belaj pecoj de sia lastatempe ree ekkreskinta poezia fekundo. Sed mi jam foruzis pli ol multe el mia spaco, tial do mi nur mencias la recenzojn laŭdinde seriozajn kaj la ilustraĵojn, ĉe kiuj validiĝas la principo: »Al ĉiu laŭ lia plaĉo«. En la unua duono oni trovas la agrable rondajn virinajn nudojn de *Svabinsky*, en la dua la interese magrajn, volupte asketajn nudojn de *Modigliani;* ĉi lastajn akompanas la konkurse premiitaj poemoj de *Gabriel Mora i Arana*. Laŭ mi, li meritis la premion.

ESPERANTA FINNLANDO certe meritas nian distingitan atenton, kiel gazeto aperanta en la ĉi-jara kongreslando. Tre leginda estas tuj la unua artikolo: »Novaj nekonataj materialoj pri Maksim Gorkij kaj Esperanto«. Mi scivole atendas la daŭrigon. Utila estas la intervjuo kun akademiano E. Sonnenfeld pri la tikla demando: Kiom da homoj parolas Esperante ? Ankaŭ nia Balkányi kontribuas per ne seninteresa artikolo. Li, laŭ sia kutimo, pafas kelkajn kanonkuglojn kontraŭ la neologismoj. Tamen — ĉu bedaŭri ? — li perdis iom el sia ŝtala konstanteco, ekzemple li indulgas la vortojn »trista« kaj »povra«. Sed cetere li kondamnas la tro multajn vortojn, kiujn la kompatinda esperantisto devas lerni. Li citas ankaŭ japanan esperantiston, laŭ kiu oni devus redukti la lingvon je minimuma vorttrezoro kaj esprimi ĉion per kunmetoj. Fakte oni povus fari tian ŝparegon, ekzemple diri *naĝveturilo* anstataŭ *ŝipo* kaj *naĝveturilaro* anstataŭ *floto*. Eble ankaŭ *ĉevalazenmikso* anstataŭ *mulo*, *sidmeblo* anstataŭ *seĝo*, *malpozitiva* anstataŭ *negativa*. Per ĉi lasta malvorto mi rememoras, ke mi legis en Esperanta Finnlando tre konvinkan, tre bone argumentitan artikolon de Vilho Setälä kontraŭ malvortanstataŭaĵoj. Tie li skribis, ke absolute ne povas temi pri pli malforta esprimvaloro ĉe la mal-vortoj: *malforta*, *malbela*, *mallonga*, *malproksima* tute ne estas malpli sencelvokaj ol *febla*, *turpa*, *kurta*, *lontana*. Min tute konvertus tiu artikolo, se — fatale — mi ne legus en la sama Esperanta Finnlando artikolon laŭmerite laŭdantan la libron de Setälä »Fortoj de l'Vivo«. Nome la titolo de tiu artikolo estis »Diamante dura«. Mi kolapsis. Post rekonsciiĝo mi rekonis, ke la verkinto de tiu artikolo vere ne povis skribi »Diamante malmola«, ĉar tuj evidentus la vero de la versoj de Kalocsay:

» . . . estas mia sento malgraŭvola,
ke la *malmola* molas pli ol *mola*«.

KOMUNA ESPERANTO GAZETO, organo de la Federacio de Esperanto-organizoj en Nederlando, surprizis min per la malofta ĝojo, ke ĝi eldonis ĉi-jare du 5-ajn numerojn de majo. La gazeto estas certe tre lerta instruilo. Ĝi enhavas tradukleciono jn el E-o kaj en E-on, lerte redaktitajn kaj imitindajn ankaŭ de aliaj naciaj E-gazetoj. Plej interesa mi trovis artikolon de S. Aarse pri la libera lingvoevoluo. Kaj se la evoluo estas libera, mi ne pensas, ke liaj konsideroj povos ĝin meti en karceron. Mi menciu ankoraŭ la noton de Verloren van Themaat, kiu refutas la tezon pri la neebleco de vortludoj en Esperanto, argumentante per la ekzisto de Raymond Schwartz. Li estas prava. Mi estas konvinkita, ke oni povas transmeti en E-on kun kelke da spriteco ĉiujn vortludojn de la komedio »Love's Labours Lost« de Shakespeare (diligentaj ŝekspirologoj kalkulis da ili 246).

ESPERANTO de UEA aspektas kiel ĉiam tre vigla per la lerta paĝigo kaj abundaj subtitoloj, kiuj kelkfoje faras la gazeton ekscite interesa, eĉ se oni ne legas ĝin. La sensacio de la junia numero estas la retrovita poemo Zamenhofa, ruslingva kun la traduko de *Hilda Dresen*. Kaj mi ne povas ne gratuli kaj bondeziri al samideanino *Mary Luplau* je ŝia centkvara naskiĝtago. Permesu al mi la revuo, ke mi deziru al ĝi la duobliĝon de ĝia paĝonombro kaj ke ĉi tiu pluso enhavu nurajn literaturaĵojn kaj recenzojn.

Ĉiam estas kvazaŭ festotago, kiam ni ricevas numeron de NUNTEMPA BULGARIO aŭ de RIPOZOJ. Ne nur la kvalito de la koloraj kaj senkoloraj ilustraĵoj estas unuaranga, kelkfoje vere fascina, sed ankaŭ la vizaĝoj, pejzaĝoj, bildoj estas belegaj kaj kreskigas al ĉiu leganto grandan simpation al la bulgara lando kaj popolo. Estas vere tre plaĉe, kiel zorge la bulgaroj flegas la antikvan heredaĵon de Trakio, ĉiam memorigante min pri tio, ke *Orfeo* vivis iam sur la nuna bulgara teritorio.

REMEMORO PRI LA 54-a UK EN HELSINKI

Nederlandaj geedzoj montras al hungaro kaj aŭstrino la subskribon ricevitan de Ödön Kisházi, Alta Protektanto de la U. K. en Budapeŝto

Nur el libroj kaj magazinoj mi legis pri Finnlando, nur helpe de bildoj mi provis havigi al mi almenaŭ imagon pri Helsinki, la »blanka urbo« »filino de Orienta Maro«, ĉefurbo de la lando kaj nun jam duafoja scenejo de la Universala Kongreso de Esperanto. Jam hejme mi trovis la kialon de la epiteto »blanka«, nome mi aŭdis, ke estas tradicia en la finna arkitekturo la neĝblanka koloro de la konstruaĵoj. En tiu koloro pompas ekzemple la impona katedralo, la universitato, parlamentejo, urbodomo, stadiono. Ankaŭ ĉe la plejmulto de la domoj ĉu oficialaj, ĉu privataj regas la blanka koloro. Mi sciis ankaŭ tion, ke la nacia trezoro por la finnoj estas la ligno pro la abundo de arbaroj konsistantaj el abioj, piceoj, diversaj aliaj koniferoidoj kaj ĉefe el blanktrunkaj betuloj. Tamen mia imago montriĝis malriĉa apud la realo, kiu multe superis mian anticipe nur teorie nutritan fantazion. La blankaj belstilaj konstruaĵoj meze de la freŝe-verda naturo, la harmonio de tiuj simplaj koloroj tutlande videbla donas unikan, tre karakterizan aspekton al la tuta lando kaj forte impresas ĉiujn gastojn, kiuj havas okazon unuafoje viziti tiun tre simpatian nordan landon.

Ni kongresanoj ĉiutage povis ĝui la belecon de tiu animĝojiga kolorharmonio, ĉar la kongreso okazis ne en la urbo, sed en la kvartalo Otaniemi trans la fjordo okcidente kaj najbara al la ĝardenurbo Tapiola. Verdaj kampoj, parkoj, arbaroj ĉirkaŭbarakumis la centran kongresejon Dipoli kaj la Teknikan Altlernejon, scenejon de multaj prelegoj kaj tiun de la solena fermkunsido. Eĉ tra la fenestroj de salono servanta por la kunsidoj de UEA-komitato, amike koketis kun ni la verdaj arbfolioj.

Pro la situo de la kongresejoj la gastoj loĝantaj en la urbo Helsinki, (pli ol la duono de la kongresanoj), por atingi la kvartalon Otaniemi devis aŭ ĉirkaŭveturi la fjordon, aŭ veturi rekte per pontoj, kiuj interligas la insulojn. Survoje oni trapasis grandan insulon, kie situis unu el la kampadejoj.

Laŭ mi scio unuafoje okazis, ke la Universala Kongreso plenumis sian laboron ne en kadro de dense loĝata loko, sed fore de la urba kakofonio, en regiona medio. Tio havis sendube kelkajn avantaĝojn, tian certe por la adorantoj de la naturbelaĵoj, sed tio kaŝis en si ankaŭ iom da nedezirinda malutilo. Neniu dubas pri tio, ke la aranĝo de niaj kongresoj estas konvena rimedo por fari efikan propagandon al Esperanto. Primara celo de la Universalaj Kongresoj: esti grandiozaj demonstracioj por la esteruloj. Nu ne bezonas apartan motivon, ke ju pli nombra estas la publiko, des pli grandan ŝancon ni havas al rezulto. Spontane leviĝas do la demando: ne estus pli bone, se la kongresaj manifestacioj, la tuta kongresa vivo okazus prefere en la urbo mem?

Estis iom ĉagrena la nescio de Esperanto ĉe la oficistoj de la kongresa poŝtoficejo kaj en la partera memoraĵvendejo. Almenaŭ ĉe tiaj frekventataj lokoj estas dezirinde prizorgi junajn esperantisto-interpretistojn, kiujn certe ĝojigas la eblo konversacii kun plej diversaj eksterlandanoj.

Tamen la menciitaj mankoj kaj difektetoj estis nur pigmeaj kompare al tio, kion ni ricevis de la kongreso. Altrangan artan ĝuon kaŭzis al ni la tre lerte aranĝita finna vespero kun ĝia nacia karaktero.

Bonege estis komprenebla la prezentado en la tre moderna Urba Teatro de Helsinki. Ni vidis tri unuaktajn teatraĵojn, kies aktoroj ludis elstare eminente. Sed timeme mi demandas ĉu ne sufiĉus nur unu verko figuranta frenezulon?

Ne estas mia intenco paroli pri ĉiuj aranĝaĵoj, kiuj estis bone organizitaj kaj plaĉis al ni. Resume ni povas konstati, ke ni sentis dum la kongreso vere amikan internacian atmosferon. Ni ekkonis pli proksime homfratojn karajn por ni hungaroj. Ni interplektis amikecojn, kiuj estos utilaj en nia komuna agado en Esperantujo kaj per Esperanto.

Cetere la utilo de niaj mondkongresoj estas mezureblaj el plej diversaj vidpunktoj. Por sola esperantisto, ankoraŭ novico ĉe ni, se flankelasi nun la diversajn personajn eventojn, ege efikas la pruviĝo, ke nia lingvo efektive plenumas sian taskon: esti relative facile akirebla kaj praktike uzebla rimedo al la interkompreniĝo de divers-lingvanoj. Li ne spertos komplekson de malsupereco, ĉar ne gravas la aparteno al granda aŭ malgranda nacio. Esperanto ne estas ja monopoligita lingvo de nur unu lando, kaj la respekto akirebla por la kongresano dependas sole de lia persona sperteco kaj rutino. »Bona pastro lernas ĝis sia morto« — diras hungara proverbo. Jes, eĉ malnova esperantisto hungara povas lerni okaze de niaj kongresoj, kiel prononci korekte, respektive kiel konscie elimini ekzemple la tro akre aŭdeblan hungaran »é« vokalon sur loko de la akcenta esperantlingva »e«. Tiamaniere ni iom post iom atingos la plenan unuecon de E. prononco ankaŭ en internacia skalo.

Ni estas nun jam post la kongreso. Mia persona konvinko diktas al mi la aserton, ke la 54-a U K apartenas al la bone sukcesintaj kongresoj. Ĝi estis vere alloga kongreso en tre alloga lando.

d-ro Jozefo Mátéffy

NIA EKSLIBRIS-ARTO

La nuntempa hungara grafiko havas konsiderindan lokon en la tutmonda grafiko. Al tiu rezulto en granda mezuro kontribuis la kolektantoj de grafikartaĵoj, ĉar tiuj kolektantoj kaj en la internaciaj ekspozicioj kaj helpe de siaj personaj interrilatoj igis konataj en vasta sfero la verkojn de niaj artistoj. Por povi krei tiujn interrilatojn multe helpis ilin la Esperanta lingvo, ĉar ĝi tre faciligas kaj igas pli rezultoplena la personan kontakton.

La Hungara Etgrafika Rondo Amika eluzis la eblojn de la Internacia Lingvo, kaj pluraj el ĝiaj membroj sendis siajn kutimajn novjarajn bondezirojn al la eksterlandaj kolektantoj jam en Esperanto.

La rekonon de nia laborado signas la decido de nia mondorganizo FISAE en ties kongreso en Komo (Italio) en 1968, laŭ kiu decido la sekvontan internacian kongreson de la kolektantoj de etgrafikartaĵoj oni okazigos en Budapeŝto, aŭtune de 1970, kaj la aranĝadon oni komisiis al la Hungarlandaj kolektantoj.

En la renovigita Hungara Vivo ni, la amantoj de la grafiko kaj kolektantoj de ekslibrisoj, aprecas kompreneble unuavice la modernajn tipografiajn kaj grafikajn solvojn, kaj tiu ĉi antaŭenpaŝo donis al ni la ideon fondi amikecon kun la revuo, amikecon, kiu promesas sin fruktodona por ambaŭ partioj. Sincere ni ĝojus, se nia unua prezentiĝo en la revuo povus riĉigi per nova koloro la vivon de la esperantistoj konataj ĝenerale pri ilia ŝato al vojaĝado kaj kolektado. La etgrafikaj verkoj de renomaj artistoj, la t. n. ekslibrisoj estas plej ofte samvaloraj kun iliaj pli ampleksaj kreaĵoj, kaj havas la grandan avantaĝon, ke ili havigeblas relative pli facile kaj pli malmultekoste. Inter ni multaj volonte estigas interŝanĝ-kontakton kun eksterlandaj kolektantoj parolantaj Esperanton.

Ni esperas, ke en konsiderinda nombro estiĝos interŝanĝ-kontaktoj, dank'al kio ni povos saluti plurajn el niaj amikoj-esperantistoj en la Budapeŝta kongreso de la ekslibris-kolektantoj de la mondo.

D-ro Jenő Reisinger

Tr.: *T. Ujlaky-Nagy*



Dr-o József Bognár, akademiano, ekonomisto, universitata profesoro, prezidanto de la Instituto Por Kulturaj Interrilatoj; prezidanto de la Komitato Pri Plano kaj Budĝeto de la Parlamento donis intervjuon al »Hungara Vivo« pri la nova sistemo en la direkto de la ekonomio, valida ekde la 1-a de januaro 1968. Profesoro Bognár havis grandan rolon en la prilaboro de la principoj de la hungara ekonomia reformo kaj ankaŭ en la projektado de la konkretaj, praktikaj paŝoj.

Demando: Kiaj faktoroj motivis la reformon de la hungara ekonomio?

Respondo: La historio de la ekonomia evoluo estas — en ĉiu lando — la historio de pli-malpli grandaj ŝanĝoj, reformoj. La evoluo stagnas, se oni kontinue ne klopodas produkti, vendi kaj konsumi per la plej oportunaj kaj fruktodonaj iloj kaj metodoj. La malnovaj formoj kaj metodoj de nia ekonomio originis el tiu ekonomihistoria situacio, kiun ni devis fronti antaŭ du jardekoj: duonfeŭdala agrara lando kun neevoluinta industrio. La komencita intensa industriigo post la dua mondmilito okazis izolite disde internacia konkuro. Sed intertempe la ekonomio iĝis pli kaj pli interdependa kaj la tasko jam estis ne simpla industriigo sed teknika evoluo kaj partopreno en la internacia komerco.

Novaj pretendoj naskiĝis kaj ili necesigis la adapton de novaj formoj, metodoj en la planado kaj organizado de produktado, vendado kaj konsumado. La ĝis-tiama sistemo de centra direktado de la ekonomio pruviĝis malmoderna en multaj rilatoj, tial oni devis estigi novan ekonomian, modernan mekanismon.

D.: Kio estis via rolo en la preparado de la reformo?

R.: La prilaboro de la ekonomia reformo estis kolektiva entrepreno. Ne estas ekonomiisto, aŭ ekonomia fakulo, kiu en solo povus entrepreni tian taskon. Estas kompreneble, ke mi mem, kiu partoprenis en la prilaboro de la ekonomiaj planoj de pluraj evoluantaj landoj, aktive kunlaboris en la transformigo de le ekonomia sistemo de mia patrujo. Ni planis la vastasferan reformon de la hungara ekonomio startinte el la kritiko de la antaŭa mekanismo kaj ni fruktuzis internaciajn spertojn, priatentante la specifajn cirkonstancojn hungarlandajn.

REFORMO DE LA HUNGARA EKONOMIO



— intervjuo kun dr-o József Bognár —

D.: Sinjoro Profesoro, kiel vi povus resumi la ĉefajn trajtojn de la reformo?

R.: Antaŭ ĉio mi devas emfazi, ke la ekonomia reformo estas pli ol ekonomia problemo. Estas ja ĝenerale konate, ke la ekonomio estas profunde influata de sociaj kaj politikaj faktoroj. Novaj sociaj, politikaj sistemoj fundamente influas, multfoje radikale transformas la ekonomian sistemon de la koncerna lando, aliflanke evoluo kaj ŝanĝoj en la ekonomia sistemo signife influas la elformiĝintajn cirkonstancojn politikajn kaj sociajn.

Nia reformo celas estigi oportunan rilaton inter la fundamentaj idealoj kaj rezultoj de la socialismo unuflanke kaj la ekonomia racieco kaj efikeco aliflanke. En la spirito de la reformo ni serĉas la ekvilibron inter la direktantaj organoj kaj la ekonomiaj entreprenoj. Praktike tio signifas la decentralizadon de la sistemo de l'direktado — inter raciaj kadroj, la rekonon de la postuloj rezultantaj el la ekzisto kaj evoluado de la rilatoj inter varo, mono kaj merkato. Tio signifas — pli ĝenerale — la retaksadon kaj reformadon de la nacia politiko scienca, klopodojn plibonigi la strukturon de la ŝtato, estigi novajn formojn instigajn, disvolvi la kreajn kapablojn; entute tio signifas la realan altigon de la vivnivelo, la disvolviĝon de la socia demokratismo.

D.: Kio necesigis la reformon de la nacia politiko scienca?

R.: En la mondo estas sciencateknika revolucio. Kelkaj branĉoj de la scienco — precipe de la naturscioncoj — evoluis kaj evoluas senĉese kaj tiel rapidege, ke ni nepre devas modifi la sciencan politikon de la pasinta epoko, se ni volas konkuri kun la rezultoj de la avangardaj landoj. La objekto, celoj, iloj kaj rezultoj de la scienca revolucio ne estas apartigeblaj de la ekonomio. Tial en la evoluigo de la scienco la principoj kaj postuloj derivitaj el la ekonomia evoluo devas efektiviĝi.

D.: Kio estas via starpunkto pri la interrilato de la nacia politiko scienca kaj la internacia scienca evoluo?

R.: Nuntempe ne estas lando, kiu povus efektivigi sciencan aŭtarcion. La registaraj reforminstrukcioj komplete forĵetas la ideon de scienca aŭtarcio. La evoluigo de ĉiuj branĉoj de la scienco estas neracia precipe por malgrandaj landoj. Ni devas aliĝi al la fluo de la internacia scienca esplorado per interŝanĝo de sciencaj spertoj, kooperacio kaj komuna esplorado kaj per aĉeto de patentoj. Scienca kaj ekonomia kooperacio estiĝis jam kun eŭropaj socialismaj landoj kaj pluraj evoluintaj landoj okcidentaj. La reforminstrukcioj aludas ankaŭ al la libereco de la scienca esplorado kaj al la respondeco konscienca de la esploristoj.

D.: Kiel interrilatas la ekonomia reformo kaj la projektita reformo de la strukturo de la ŝtato?

R.: Dum la preparado de la ŝtatstruktura reformo ni konstatis, ke la stilo kaj metodoj devas ŝanĝiĝi en multaj rilatoj. Inter aliaj oni klopodu prilabori ĝustajn alternativojn por la decidoj. En la registaraj planoj kaj decidoj ne nur la tutsociaj, sed ankaŭ la koncernaj grupinteresoj estu konsideritaj. Oni pli kaj pli konsideru la atendeblan manifestiĝon de la publika opinio. Ĉio ĉi estas kondiĉo de la sukceso de la ekonomia reformo; la ekonomio — kiel mi jam diris — ne estas sendependa de la socia kaj politika sistemo. Same ĝi ne estas sendependa de la ŝtatstrukturaj faktoroj kaj de la registara agado.

D.: Ĉu la nova sistemo de la direktado ne endanĝerigas la fundamentajn rezultojn de la socialismo?

R.: Kontraŭe ! La ekonomia reformo ĉiurilate firmigas kaj evoluigas la socialisman socian ordon. La esenco de ĉi tiu socia ordo estas ne nur la posedaj rilatoj — kiuj cetere restas senŝanĝaj — sed ankaŭ la justa (laŭlabora) distribuo de la havaĵoj, konstanta altigo de la vivnivelo, la kreskanta efikeco ekonomia, libera disvolviĝo de la individuaj kapabloj k. t. p.

D.: Kiel modifiĝas la rilatoj en la nova ekonomia mekanismo inter la nacia kaj la internacia ekonomioj?

R.: En la malnova mekanismo oni klopodis kontentigi la postulojn unuavice (sendepende de la produktaj elspezoj) per la evoluigo de naciaj produktaj kapacitoj. La ekonomia reformo instigas nin evoluigi eksportkapablajn kapacitojn kaj la reformo instigas importon en branĉoj por ni ne oportunaj. Do ni deziras modifi la rilatojn inter la hungara kaj la internacia ekonomioj pli racie kaj elaste.

D.: Kiajn spertojn donis la unuaj du jaroj de la ekonomia reformo? Ĉu oni povas rigardi la unuan, »eksperimentan« periodon sukcesa?

R.: Ni enkondukis la reformon post longa scienca analizo kaj multaj diskutoj. La konscienca preparo portis sukceson. Ni povas jam paroli pri sukcesoj, rezultoj, kvankam ni vere rigardas la unuajn jarojn eksperimenta periodo. Troviĝas modifendaĵoj, korektendaĵoj, sed la nova mekanismo funkcias bone kaj sekure.

D.: Kaj fine: Ĉu vi rigardas, Sinjoro Profesoro, Esperanton utila ilo en internaciaj ekonomiaj, sciencaj, kulturaj kaj aliaj interrilatoj?

R.: Nia socio estimas ĉiujn ideojn kaj ilojn, kiuj akcelas pacajn rilatojn inter homoj. Ekde sia naskiĝo Esperanto servis pacajn interrilatojn. Mi, propra persone, opinias Esperanton taŭga por tio, ke ĝi iom post iom fariĝu la internacia lingvo de la sciencoj, senantaŭjuĝa ilo de la internaciaj kontaktoj. Ĝoje mi vidas la rapidan disvastiĝon de la Internacia Lingvo en la tuta mondo. Mi deziras sukceson al la uzantoj kaj propagandistoj de Esperanto. Mia konvinko estas, ke ili servas noblan ideon.

Gábor Vigh

101 teknikaj novaĵoj - de geedza paro

La industrio de Hungario evoluis grandskale en la pasintaj du jardekoj, kaj multaj el ĝiaj produktaĵoj ĝuas aprecon en ĉiuj kontinentoj. La ĉiam pli evoluinta granda industrio, kiu estas en ŝtata-socia posedo, tute ne ekskludas tamen la utilan laboron kaj prosperon de multaj miloj da metiistoj, de la t. n. »priseko«, t. e. privata sektoro. Frapan ekzemplon pri tiu utilo kaj prospero mi povis vidi en la ĉi-jara Budapeŝta Internacia Foiro, kie, sub la egido de la Landa Patent-Oficejo, aparta ekspozicio de etmetiistoj estis aranĝita. Jam post ties kelkminuta spektado evidentiĝis, ke ĉiuj ekspoziciaĵoj grandaj kaj malgrandaj tie havas gravan celon: fari al ni pli komforta kaj pli glata la ĉiutagan vivon, servi al agrikulturo, higieno ktp. per praktikaj novaĵoj.

Nian simpation pligrandigis, ke mastroj de 101 ekspozitaj inventaĵoj estas geedzoj: teknikisto Julio *Schmálik* kaj lia edzino, teknika desegnisto. S-ino Schmálik per siaj afablaj klarigoj pli funde komprenigis la esencon kaj uzeblon de la eltrovaĵoj.

Pleje plaĉis al mi tamen la iloj, aparatoj, kies funkciadon mi povis kompreni sen aparta klarigo. Jen kelkaj simplaj inventaĵoj:

Etporcia pakado de diversaj fluidaĵoj en duobla polietilena kovraĵo. Ekz. Se turisto volas kunporti al la montaro de Buda fruktosukon, li povas ricevi ĝin en 20—30 dekagrama pakaĵo kun duobla kovraĵo. La lernanto ricevas sian ĉiutagan lakton trinkotan en la lernejo en simila saketo kun duobla kovraĵo. Inter la du kovraĵoj (folioj) estas metebla ia ajn presejfarita teksto.

Kaj nun atentu, karaj dommastrinoj: mi vidis en la ekspozicio kunfermeblan aĉetsakon, kiu estas ankaŭ starigebla sur pavimo aŭ aliloke, sen danĝero de disfalo. Al la mastrumado kaj ankaŭ por la restoracioj servas glaci-kubo fermita en plaston.

Ankaŭ por aŭtomobilistoj mi vidis utilan novaĵon: distilitan akvon, fermitan en plasto-folion.

Jen lertaj eltrovaĵoj por la higieno: ganto el maldika polietileno, forĵetata post ununura uzado (ekz. ĉe gravaj malsanuloj, ĉe frizistoj ktp.)

En aparta angulo estis lokita novsistema kokid-breda »domo«, laŭ triangula formo. Kano plus polietileno konsistigas la maldikajn murojn. Ĉ. kvindek kokidetoj pepis, manĝis kaj trinkis en sia moderna hejmo; mi supozis, ke ankaŭ al ili plaĉis la ekspozicio.

Por pli grandaj bestoj servas trinkaparato kun aŭtomata reguligo de la temperaturo kaj de akvonivelo.

Ĝoje la vizitantoj spektis la modelon de forcejo el plasta folio. Ankaŭ ĝis nun estis konataj diversaj tunelstrukturaj forcejoj, sed tiu ĵus vidita kombinaĵo kun kano estas pli praktika, ol la ĝis nun ekzistantaj.

Por fakuloj — teknikistoj, inĝenieroj — pli gravas la diversaj maŝinoj kaj aparatoj, ekz. la plasto-veldmaŝinoj, inter ili la agrikultura piedmekanika veldmaŝino, la mekanika saket-ferma maŝino. Precipe vigla estis la interesiĝo pri la pakmaŝinoj, el kiuj la hungara entrepreno Technoimpex eksportis multajn al eksterlando.

La hungara gazetaro multe okupis sin pri la ekspozicio, ankaŭ la Televido prezentis la inventaĵojn kune kun la inventista geedza paro. Julio Schmálik diris al la ĵurnalisto: La problemoj, la taskoj min interesas nur ĝis mi solvas ilin. Kaj mi volus instigi ankaŭ aliajn homojn, publikigi siajn utilajn ideojn kaj inventojn.

La Patent-Oficejo certe akcelos ĉi tion ankaŭ plue, dononte terenon al la eltrovema agado de »privataj« metiistoj.

L. Kökény

La Asocio de la Hungaraj Fotoartistoj

aranĝos en 1970 en Budapeŝto internacian priartan fotoekspozicion, kiu havos la temon:

»La lastaj 25 jaroj«.

La bildoj senditaj al la ekspozicio devos paroli per siaj artaj rimedoj pri la karakterizoj de la periodo pasinta depost la milito, pri la krea forto de la homa spirito, pri la zorgoj kaj problemoj de la vivo, kaj demonstri la nuntempajn strebadojn de la popoloj kaj de la kontinentoj.

La limdato de la ensendo de la fotoj en formato 30×40 cm-oj estas la 31a de januaro 1970. Adreso: Magyar Fotoművészek Szövetsége, Budapest 5. Postafiók 203.

Teknikaj tagoj

En la dua duono de la jaro en pluraj landoj oni aranĝis hungarajn teknikajn tagojn. En septembro kaj oktobro la hungara teknika scienco prezentis sin en Prago kaj Bratislavo, poste en Moskvo, Kievo kaj Leningrado. La ĉefpatrono de la tradiciaj teknikaj tagoj en Vieno, okazigitaj fine de oktobro, estis d-ro Ferenc Lévárdi, la ministro de la peza industrio. En tiuj tagoj en la ĉambregoj de Collegium Hungaricum dudek prelegoj konigis la novajn rezultojn de la hungaraj petrolindustrio kaj maŝinindustrio, tiujn de la instrument- kaj kemioindustrio, kiel ankaŭ de la cibernetiko. La serio de la ĉi-jaraj teknikaj tagoj finiĝos fine de decembro en Sofio.

Nova hungara mondpatento

En la Manufaktura Produkta Kooperativo pri Elektroakustiko kaj Elektro oni komencis la produktadon de la patentitaj aŭtoantenoj funkciantaj per elektromotoro. La suma pezo de la anteno estas 70 dekagramoj. Ĝi estas provizita per triŭata motoro, kiu je la ŝalto de la radio aŭtomate ellevas kaj etendas la tigojn de la dipola anteno. Eksterlande oni tuj ekatentis pri la nova konstruo, kaj la firmoj Skoda, Fiat, Volkswagen kaj Wartburg jam anoncis sian mendon en suma valoro de dek milionoj da forintoj.



PLILONGIGU VIAN EKSTERLANDAN RESTADON... MALLONGIGU LA VOJAĜTEMPON...

FLUGU PER MALÉV!

Direktaj fluglinioj inter BUDAPEŜTO kaj ĉi-subaj urboj:

AMSTERDAMO	DAMASKO	LONDONO	PRAGO
ATENO	DUBROVNIKO	LUKSEMBURGO	ROMO
BEJRUTO	FRANKFURTO	MILANO	STOKHOLMO
BEOGRADO	HELSINKO	MOSKVO	SOFIO
BERLINO	ISTANBULO	MUNKENO	TIRANO
VIENO	KAIRO	NIKOZIO	TUNISO
BRUSELO	KIEVO	OSLO	VARSOVIO
BUKAREŜTO	KOPENHAGO	PARIZO	ZURIĤO

MALÉV biletvendejoj:

Budapest V., Váci utca 1.

kaj

Dorottya utca 2.

TELEFONO: 186—805

MALÉV

Magyar Légiközlekedési Vállalat

(HUNGARA AERTRAFIKA ENTREPRENO)

NUR POR VIRINOJ

nur superece saĝa, sed ankaŭ homo kun harmonio. Ŝi diras: mi faras ordon en Anglio. Kaj tio estas simpatia.

— *Ĉu ankaŭ vi estas simila ordokreanto?*

— Mi ne scias; la mondo, en kiu ni vivas, efektive ne estas en ordo. Mi volus helpi ĝin laŭ mia forto. Montri, kian gradon mi atingis en la vivokono, kion mi scias pri la homo kaj pri la homforma ordo.

— *Ĉu laŭ via opinio tio estas tasko de la aktoro?*

— Nu jes. Kompreneble. Ne nur tasko, sed ankaŭ servo. Plibonigi la homojn. Abomeni la mensogon. Batali kontraŭ ĝi. La homoj vivantaj kun aĉaj pensoj kaj mensogoj povas fari multegajn damaĝojn en la mondo. Eĉ nevole, eĉ al tiu, kiun ili amas. Ili imagas, kia devas esti — ni diru — la bona infano aŭ la vera edzo aŭ la ekzemplodona subalternulo, kaj finfine ili devigas sur falsan vojon la proksimulojn. Mi estas aktorino ankaŭ por tio, ke ĉiam mi povu esti mi mem.

András Lukácsy

Trad. *L. Kökény*

INTERVJUO KUN ÉVA RUTTKAI

Unu el la plej simpatiaj reprezentantoj de la eminenta aktoraro de nia lando estas la aktorino Éva Ruttkai, Kossuth-premiita.

*

— *Diru kvin rolojn, kiuj staris plej proksime al via koro dum via aktorina kariero.*

— Ho ve!

— *Diru do, sed tiel, ke vi ne meditas, nek multe pesadas dume. Bonvolu.*

— Nu bone, mi provos. *Margareta* kaj *Zilia*,* la japana fraŭlino el la *Teodomo*. Poste, nature, la virino en la teatraĵo *Ho, amo!*, kaj — jes, tio estas vera — *Ostra Manjo*.

— *Ĉu vi ne alkalkulas Julietan?*

—Kompreneble, Julieta. Sed tiu rolo hodiaŭ jam ne kontentigas min plene. Mi deziras montri vivojn pli kompletajn.

— *Ĉu la vivo de Julieta ne estas kompleta?*

— Ne pri tio temas. Sed ŝi mortas tro frue. Ŝi ne havas tempon por sin montri, konigi. Kaj tio tamen estas bezonata por la vera kreo de rolo.

— *Kaj ĉu Elizabeta de Anglio?*

El tiu vidpunkto ŝi estas efika figuro: ŝia rolo donas eblaĵon ludi virinon maturan, virinon de granda vivosperto. Elizabeta maljuniĝas sur la scenejo. Tial mi povas prezenti longan vivosorton, se tiel plaĉas: plenan modelon pri la vivo. Pri ekvilibrita vivo. Ĉar Elizabeta estas ne

* Margareta el »Faŭsto« de Goethe, Zilia el »Muta kavaliro« de Heltai.

Kuirejon mi eniris...

Post la entuziasmaj tostoj de la du hispanaj poetoj je la gloro de la hungara kuirarto, ni iru en la kuirejon por vidi, kiel pretiĝas kelkaj hungaraj specialaĵoj, al kiuj ni deziras bonan apetiton!

Kokinsupo Ujházi. Kuiru kokinon purigitan kaj dispecigitan (1.5 kg.) en du litroj da akvo, aldonu tri karotojn, du petroselradikojn purigitajn kaj tranĉitajn kvaropige, unu napon, apion kaj kapsikon, laŭguste cepon, ajlon, salon, piprograjnon. Post la moliĝo de ĉio ĉi, filtru la supon kaj kuiru en ĝi vermiĉelojn. Ĉe pladumo la supon verŝu sur la viandon.

»Kuiriston vaporo satigas«

tamen, ni prenu ankaŭ pladon duan en kiu bonodoras

Farĉita brasiko. Al 50 dg. da freŝa kaj 50 dg. da fumaĵita porkviando muelitaj donu 10 dg. da duonkuirita rizo, unu ovon, unu cepon raspitan, laŭguste pistitan pipron, salon kaj paprikon. El la miksaĵo de ĉio ĉi faru knelojn (bulojn) de persika grandeco kaj ĉiun bulon strikte vestu per survolvita brasikfolio. En kaserolon metu saŭrkraŭton (acidigita brasiko), sur ĝin la bulojn kaj 0.5 kg. da fumaĵita kolbaso, surverŝu akvon ĝis kovro de la tuto. Kuiru ĝin per lanta boligado, post ĝia moliĝo densigu ĝin per kelke da fritita faruno. Ĉe pladumo abunde aspergu ĝin per acideta laktokremo.

»Dum la manĝado venas apetito«

do jen la tria plado:

Gratenita fiŝo. La fiŝon, plej konvene sandron, ezokon aŭ karpon, distranĉu en egalajn fileojn, salu ĉi tiujn kaj rulu ilin en faruno, poste en kirlita kruda ovo, fine en paneroj, fritu ilin en varmega graso aŭ manĝoleo ĝis ruĝiĝo. Garnu la fileojn per terpomoj frititaj en butero, ornamu la pladon per citrontranĉaĵoj.

»Fiŝo volas naĝi.«

Tial ni devas elserĉi nun la plej konvenan vinon post fiŝmanĝo. Ĝi estas la *Griza Monako* (Szürkebarát) de Badacsony, fama vinmonto apud la lago Balatono. Pri ĝi, pro ĝia fajra aromo, estas trafe diri:

»Por vino bona, ŝildo ne bezona.«

Saĝa sentenco diras: »Homo malsata ne estas elektema«. Jes, la homo malsata. Sed niaj gastoj nun jam tiel satas, ke ni devas zorgi pri frandaĵo palatkaresa kaj de nerezistebla allogo. Tia estas:

Krespo (patkuko) kazeofarĉita. 30 dg. da faruno, du ovojn, 3 dg. da sukero, pinĉprenon da salo kirlu kun tiom da lakto, ke ĝi densu kie saŭco. Kuleron da graso varmegigu en fritpato, verŝu en ĝin duondecilitron el la kirlaĵo, disfluigante ĝin egalmezure. Post la pala ruĝiĝo de la suba flanko,

turnu la kukon per trançilklingo kaj fritu palruĝa ankaŭ la alian flankon. Farĉaĵo: 50 dg. da kazeo dispremita, unu ovoflavo, 5 dg. da sekvinberoj, iom da raspita citronŝelo kaj laŭguste sukero. Kuleron da farĉaĵo metu en la mezon de la krespoj, rulvolvu ilin kaj loku en pladon fajrorezistan, aspergu la tuton per laktokremo, baku ĝin en bakujo ĝis ruĝetiĝo. Ĉe pladumo surŝutu sukeron.

»Troa festeno estas veneno.«

Do plenigu ree la glasojn kaj deziru, intertintigante ilin:

Je via sano!

Mi esperas, ke ĉio ĉi gustos al vi bone kaj neniu diros:

»Kiu kaĉon kuiris, tiu ĝin manĝu.«

La manĝaĵojn, spicante ilin per proverboj zamenhofaj, kuiraĉis:

Ada Csiszár

Virinoj sur intelektaj postenoj

El studo de »Centra Statistika Oficejo« montriĝas konsiderinda spackonkero de virinoj sur intelektaj postenoj en nia lando. La proporcio de la virinaj kuracistoj, ekz-e, estis ĉirkaŭ 1960 ĉe ni 21.5% (en Austrio 18.1%, en Anglio 15.9%, en Francland 14.4%, en Usono 6.7%). La situacio estas simila en la apotekista branĉo. Granda estas la proporcio de la virinaj juĝistoj.

La famo de la Hungara Kuirejo

En la internacia gastronomia ekspozicio en Plzen (Ĉeĥoslovakio) partoprenis ankaŭ Hungario, krom per salamoj, konservaĵoj kaj kolbasoj precipe per pretaj manĝaĵoj. Dek diversaj pretaj manĝaĵoj debutis antaŭ la gustum-ekspertoj. Konataj en Ĉeĥoslovakio jam estis inter ili la gulaŝo Székely, la porko-kotleto Bakony, la tavolita brasiko Kolozsvár. Unuafoje sin prezentis la bovtranĉaĵo en aneta saŭco, la viandoknelo pladita en aneta saŭco, la porkotranĉaĵo Hargita, la perkelto el porko- kaj el bovoviando; ili rikoltis ŝmacigan sukceson.

Direkto: Nordo!

La *Hungarotex*, entrepreno de eksterlanda komerco, konigis en Norvegio kaj Danio la elitan kvaliton de la hungara vestindustrio en modprezentado okulfrapa, modernstila, ligita kun dancoj. La kolektaĵo jam antaŭe prezentiĝis hejme grandsukcese.

Niaj zorgoj Hungarlandaj

Nia plej grava tasko estas doni ĝustan bildon pri nia vivo, pri la beleco de niaj urboj kaj pejzaĝoj, pri nia kulturo, ekonomio, socia vivo, politikaj eventoj. Estas kompreneble, ke ni plej volonte parolas pri niaj sukcesoj kaj rezultoj. Estas homa propreco, ke en fremdlingvaj revuoj oni ne emas skribi pri la ombra flanko de la vivo.

Sed ni ne timas la realon, ni ne intencas kolorigi, beligi ĝin. Ni havas zorgojn, ni havas problemojn solvendajn, ankoraŭ ne solvitajn. Ni klopodas konigi al niaj legantoj ankaŭ la difektojn, kiuj plenrajte incitas nin mem. Niaj legantoj eksterlandaj estu ĉiam fidele informitaj ne nur pri la prospero, sed ankaŭ pri niaj malfacilaĵoj kaj zorgoj.

Tial ni lanĉas nun novan rubrikon: »Niaj zorgoj Hungarlandaj«. Ni adresas niajn rimarkojn ankaŭ al hungaraj kompetentuloj, instigante ilin solvi la problemojn. Tiel ni, hungaraj esperantistoj, volas pli kaj pli partopreni en la publika vivo de nia lando.

Hipioj — huliganoj

»Ĉu vi estas hungaro?« — demandis min kunveturanta viro super la Atlantiko inter Novjorko kaj Amsterdamo. Post kiam li eksciis, ke mi veturas hejmen post mallonga oficiala vizito en Usono, li supersŭtis min per multaj demandoj pri sia patrio forlasita antaŭ multaj jaroj. Proksimiĝinte Amsterdamon li interesiĝis, ĉu troviĝas hipioj kaj huliganoj en Hungario.

»Junuloj kun longaj, ofte malpuraj haroj kaj eluzitaj vestaĵoj« — li klarigis al mi, kvazaŭ mi ne konus la fenomenon.

Nu, mi priskribis al li la hungaran hipion kaj huliganon. La hungara hipio ne estas originala personeco. Li imitaĉas la eksterlandajn modelojn nur en la eksteraĵoj. Li ne protestas kontraŭ io, li estas nur sinmontrema. Li estas senkultura, li praktikas nenian sporton. Li ne havas belajn pasiojn, estas mallaborema kaj malkuraĝa. Tial li fartas bone nur kune kun similuloj.

Hipioj ofte unuiĝas en grupoj, kiujn ili nomas »galerioj«. Kiam hipio aniĝas en galerion, li pograde fariĝas huligano. Kelkfoje oni legas en gazetoj pri huliganoj, kiuj damaĝis ĝardenojn, barilojn, konstruiĝantajn domojn, rompŝtelis en butikoj, violentis virinojn. Ĝis antaŭ kelkaj monatoj la leĝo agis tre indulge kontraŭ ili, sed la lastatempaj punoj estis jam severaj.

Estas stranga fenomeno, ke ofte filoj de bonstataj gepatroj fariĝas hipioj kaj huliganoj. Ĉu bonstato difektas homojn, aŭ nur filojn de gepatroj, kiuj iam mem dure perlaboris la bonstaton, — aŭ ĉu huliganismo estas infekta malsano de nia supermoderna epoko?

Malsanigaj pasioj

Ni hungaroj havas kelkajn malsanigajn pasiojn. Inter aliaj ni estas trinkemaj. (kelkfoje drinkemaj) homoj. Ĉiujare ni trinkas (en la pokapa porcio inkluzivante kaj sucĉinfanojn kaj kadukulojn) persone pli ol unu kilogramon da kafo (grajnokafo), proksimume 35 litrojn da vino kaj 4 litrojn da brando. La kontraŭalkoholisma batalo rezultigis ĝis nun nur modestajn sukcesojn.

Eĉ pli danĝeran pasion ni havas. Ni ŝatas geedziĝi kaj divorci.* Hungario estas inter la unuaj landoj laŭ la nombro de geedziĝoj, sed bedaŭrinde ni estas inter la unuaj ankaŭ laŭ la nombro de divorcoj. Tio estas unu el la kaŭzoj de la tre malalta nombro de naskitoj. En 1938 naskiĝis en Hungario 182 206 beboj, en 1954 la nombro estis 223 347 kaj en 1968 nur 154 242. Estas leĝo en Hungario, kiu ebligas abortojn. Praktike ĉiu virino mem povas decidi, ĉu ŝi naskos la bebon aŭ ĉu ŝi interrompigas sian gravedon.

Malkresko kaj espero

Troviĝas ankaŭ zorgoj esperantistaj. Je la komenco de ĉi tiu jaro HEA altigis la asocian kotizon (kiu inkluzivas ankaŭ la abonprezon por »Hungara Esperantisto« kun altigita paĝnombro) La prezaltigo estis tre modesta, tamen la nombro de la pagantaj membroj de la kluboj iomete malkreskis. Sed ni estas esperantistoj kaj esperas . . .

Gábor Vigh

divorci = eksgeedzigi

LAJOS TÁRKONY

XERXES

Sur sanga vojo al mond-akaparo
la ŝtormaj akvoj estis al li baro.
La ondojn spitajn li skurĝigis pune.
Ĉe Salamis revenĝis sin la maro.

MEZEPOKO

Lascive dancas osto kun la osto
en hor' tenebra de tombeja frosto.
Sube, ĉe tabl' infera, Belzebubo
la glason levas por rikana tosto.

VENUSO

Venus' brilegas, vualita damo.
Sub la vualo ŝi por arda amo
alvokas, kaj alpremas la amanton
al sia kvarcent gradojn varma mamo.

TRANS LA VIVOBORDO

Mi ne ĵetiĝu for trans vivobordo
sub teron por putrad' kaj vermomordo.
Cindriga fajro portu ĝojan pacon
al mi per sia flam-mizerikordo.

ADIAŬO

Viaj okuloj brilon petolan disprodigas:
jen de la viv' ludema la palpebrum' lazura,
en via lip-angulo ruben-ridet' amikas,
soifa hejm' varmega de la sopir' plezura:
via proksimo dolĉa la mondon renovigas.

Ni sidis man-en-mano dum tempodaŭr' avara.
Sed nia voj' disiĝis, ve, kun kruela brusko.
Kun trista flug' alvenas mia solec' amara,
antaŭ mi ekfantomas la griza viv-krepusko:
jen tiel mi feliĉis, proksime al vi, kara.

AŬTUNO

La sombro de l'aŭtuno kaj de la viv-vespero
min ombras en la frido de kor-lamiga solo.
Cindriĝis mia juno de blua aŭreolo,
kun frostaj florflugiloj forlasis min la Belo.

Neniam-pasan serĉi paseme sur ter-vojoj,
jen estas mia sorto, la sorto ĉiuhoma:
tial ekgutas larmoj, se kiel svarm' fantoma
el nia viv' forflugas la papilio-ĝojoj.

ENDRE SZÁSZ

Li estas unu el la magiistoj de la nuntempa hungara grafikarto kun sia originala vidmaniero, kuriozaj, fabel-etosaj figuroj kaj samtempe kun sia arta virtuozeco. Ĉiu el tiuj karaktertrajtoj de lia magnete altira kaj ekscita arto eĉ poe sufiĉis veki okaze de lia patrolanda ekspozicio akran, eĉ impetan diskuton. Kelkaj povas paroli pri li nur en superlativoj de entuziasmo, aliaj volas degradi lian artan rangon, ĝuste pro lia virtuoza desegnokapablo, ĝis rutinismo de sorĉmane lerta tekniko. Ĉi lastaj certe ankoraŭ ne vizitis lin en lia domo en Nagymaros, proksime de Budapeŝto, ne vidis liajn mapojn da desegnoj, la multegajn skizojn kaj krokizojn, kiuj atestas pri maturiĝado de po unu ideo kelkfoje dum multaj jaroj. Ili povis vidi nur la vere sorĉmanan virtuozecon de la artisto, kiam en sia ekspozicio, inter rave sinceraj vortoj de sia vivkonfeso, li prezentis sian oleografikan teknikon, eleksperimentitan de li mem. Tiam ankaŭ milionoj de la hungaraj spektantoj de televido povis admiri, kiel li alsorĉas dum kelkaj minutoj virkapon, specimenon el siaj figuroj fabel-etosaj. Por la aprecado de lia arto estas bone scii ankaŭ tion, ke Endre Szász naskiĝis en Transilvanio, plenkreskis inter la sikuloj, kie la fabelo, la fantazio, la sincereco kaj la friponeta eltrovemo kreskas kun tia sama natureco kaj riĉo kiel la popolkanto kaj edelvejso. Li desegnas ekde sia kvarjara aĝo, preparis sin por sia alvokiĝo ekde sia oka jaro, de tiam li observadis, studadis konscie la homojn, tial li scias pri ili hodiaŭ tiel multe. En la Belarta Altlernejo lia majstro estis István Szőnyi, eble la plej delikatgusta koloristo de la hungara pentroarto. Iu konstatis foje, ke Szász estas la hungara Hieronymus Bosch, iu alia eble diros lin la hungara Salvatore Dali. Ili ambaŭ eraras. E. Szász estas suverena artisto, ankaŭ lia tekniko estas tute individua, ŝajne tre facile imitebla, li eĉ volonte montras, kiel li ĝin aplikas, tamen, efektive, ne ellernebla. Kun lia popularеco hejmlanda malmultaj povas konkuri.

Li naskiĝis en Csikszereda, en 1926. En la pasintaj dekkvin jaroj li partoprenis multajn ekspoziciojn enkaj eksterlande: la bienalojn en Venecio (1960), en Brno (1966), en Sao Paulo (1967), kolektivajn ekspoziciojn en Romo, Ankaro, Berlino, Moskvo, Leningrado, Bolonjo, Londono, Helsinki, Parizo, Delhi, Stokholmo,; personan ekspozicion oni aranĝis el liaj verkoj en Bruselo kaj la ĉefurboj de la landoj de Skandinavio. Li gajnis ormedalon en Leipzig (1959), or- kaj arĝentmedalon samloke (1966), la honorigon »La kalendaro de l'jaro« en Londono (1967). Hejme en 1965 li ricevis la Munkácsy-premion.

Mihály Gergely

Endre Szász: Studkapo — Skizo Oleo-grafiko ▶

DONNA JUANA

Sándor Szathmári

Aio ripozeme kuŝadis en la lito, kiam subite en sia dekstra brako li eksentis torporon.

Iu sonorigas, — li vekiĝis. — Nome, la sonoron li ŝaltis al torporigo.

Super lia lito pendis la ŝaltbloko. Pro la multaj prembutonoj ĝi aspektis kiel erinaco. Li premis unu butonon.

Sur la granda mura ekrano aperis la bildo de Eo, la ĉiam laŭmoda »eterna junulo«. La kolumpintoj de lia jako etendiĝis super la orelojn, lia hararo meze estis elrazita, flanke ĝi atingis la ŝultrojn.

— Ia! — li salutis ĝoje kaj Aio resalutis samĝoje.

— Envenu! — diris Aio kaj premis la malferman butonon de la antaŭĉambro. — Eo envenis.

— Kiel? Ĉu vi kuŝas enlite? — li demandis surprizite. — Eble iaspeca malgrava meningito?

— Bedaŭrinde, pli grave, — respondis Aio. — Gripo. Vi jam trasuferis ĝin, tial mi kuraĝis vin enlasi.

— Feliĉe, mi jam transiĝis. Bedaŭrinde, ĉi tiun malsanon oni ankoraŭ ne povas venki. Eĉ pli: mi aŭdis, ke oni enportis ĝin jam al Venuso.

— Kvankam kiel forte oni ŝirmis Venuson! Ĉiun alveninton oni traesploris pri virusoj!

— Jes. Venuso devus resti refreŝiĝejo kaj sanigloko. Ŝajnas, ke vane. Ni estas devigataj viziti Pluton. De kiam tie oni ekfunkciigis la artefaritan Sunon, vizitas ĝin ĉiam pli multaj gastoj. Sed kompreneble oni vojaĝas tien ne per kosmoŝipo, sed per eratoro.

— Jen, vi estas teknikisto. Kiel funkcias tiu eratoro?

— La eratoro, kiel ankaŭ la nomo montras, transportas la materion per dismeto kaj kunmeto. Sur Pluto estas la kuneratoro, ĉi tie la diseratoro. La vojaĝonto ekkuŝas en la niĉo de la diseratoro, ekdormas, kaj la diseratoro diserigas la korpon al atomoj, unu atomon post la alia, dum sur Pluto la kuneratoro kunmetas ĝin el tutsamaj t i e a j atomoj al tute sama korpo, kia li estis ĉi tie. Tiel la vojaĝo okazas per lumrapido, ĉar la materio mem ne vojaĝas. Tio signifas, ke la kvin-miliard-kilometran distancon oni traveturas (kune kun la dis- kaj kunerigo) en kvindek horoj. Du tagoj ne estas multaj, kial vi ne provus?

— Mi ne ŝatas tiun erigan procedon! — kapneis Aio. — Ĉi tie mi estus diserigata kaj tie kunerigata el t i e a j atomoj. Rezulte mi ĉi tie mortus kaj tie estiĝus tute nova, fremda homo, anstataŭ mi.

— Kial vi »mortus«? Kaj kial estiĝus fremda homo? Kiel diferencas unu hidrogen-atomo de la alia? Ho jes: la homoj malsamas: Johano neniam estas identa kun Stefano, eĉ, se ili estas ĝemeloj. Sed se ĉiuj atomoj de du homoj estas samnombraj kaj samkvalitaj, tiam ili estas i d e n t a j. Ĉu vi komprenas? Identaj! Nenia diferenco troviĝas inter ili!

— Kiel identaj, se ilin konsistigas aliaj atomoj?

— Ĉar la transportita homo tie transe fariĝas ne simila aŭ egala, sed tiu sama si, kun la samaj konoj, memoroj, kutimoj, hobioj, sim-kaj antipatioj, kun la perfekte sama konscio pri si mem. Grandioza invento: vojaĝi lumrapide!

— Mi eble provus tion, — respondis Aio, — se la eratoro ne estus pro perturboj kelkfoje eraratoro: ekzemple, mia poetokolego Eao, de post tia vojaĝo, havas siajn orellobojn sur la dorso. Nu, kaj kies cerbon la eratoro plantas eraratore ekzemple en la stomakon, tiu eĉ ne ellitiĝos plu sur Pluto. Dankon, prefere ne! Pli bonvenus, se oni jam inventus la junigan procedon. Kiel statas la esploroj?

— Ĝi baziĝas sur la transluma rapido, — li komencis, sed Aio lin interrompis:

— Ankaŭ mi scias tion. Se la tempo ŝrumpas ĉe la lumrapido en nulon, tiam ĉe pli granda rapido ĝi fariĝas negativa, do retroira.

— Kion do vi volas scii?

— Kial oni ne povas transpaŝi la lumrapidon?

— Ĉar la materia korpo ĉe lumrapido kreskas infinite granda kaj tial la plua akcelo bezonas forton infinite grandan. Sed evidentiĝis, ke tio ne estas vera: la materia korpo ne fariĝas infinite, nur treege granda, do plua akcelo teorie estas ebla, kaj ni povos uzi tiun ultran rapidon por retroiro en la tempo, t. e. por juniĝo. Sed kial vi, ne maljuna, volus juniĝi?

— Ho, kriis Aio, — kun miaj 96 jaroj mi jam estas trans la vivokulmino. Mi devus rekomenci, por eviti, dank' al miaj spertoj akumulitaj, la multajn erarojn kaj mispaŝojn. Sed, ĉu ne, tio estas nur pia deziro?

— Kiel vi nun fartas? — demandis Eo.

— Sufiĉe tolereble, mi jam ne febras. Kio nova ĉe la vokalistaj knaboj?

— Kio? Eksplodis revolucio!

— Konsterne! Kaj kiamaniere?

— Nu, vi konas tiun frenezetan Eon . . .

— Ĉu tiun, kiu fondis la teorion de la pseŭdokonsonantoj?

— Jes, kaj la postulaton, ke ni, vokalistoj, prenu en niajn poemojn la jon, hon, von kaj zon. Mi jam siatempe antaŭdiris ĉi tiun kataklismon.

— Terure. Rigardi ĉiun solstare prononceblan konsonanton kiel vokalon! Kie tio finiĝos? Finfine ni akceptu eĉ la mon kaj non, ankaŭ bovino ja diras: m-m-m. Fuŝiĝos, rompiĝos, pereos la ekskluziva beleco de niaj poemoj vokalismaj!

— Sciu, ke eĉ vian propran nomon li volas modifi. Li havas poemon kun la komenco: »ajazee eo ajo«. Kaj en ĝi »ajo« estas vi mem anstataŭ »Aio«.

— Terure, aŭdace, impertinente. Tuj post saniĝo mi donos al li bonan lavon!

— Li diras, ke vi mem prononcas tiel vian nomon, eĉ ne povus alie. Cetere oni klaĉas, ke en la surtuta poŝo de Eo oni trovis vokal-ruleton.

— Ha! — ekkriis Aio. — Do helpe de tiu ilo li poetis?

— Jes. Li ekrulas la aparaton kaj sur ties ciferplato aranĝiĝas ia vorto, ekzemple »iovai«. Tiam li simple skribas ĝin en poemon. Jes, oni trovis ĝin, sed neniu kuraĝas tion al li diri, ĉar ĉiun li mortfrapus en kolero aŭ lin mem mortfrapus apopleksio. Sed, returne al la temo, kial vi volus iuniĝi? Eble kontentigi la postulojn de Uiea?

— Ve, Uiea! Ne pentru la diablon sur la muron!

Subite eksonis la telefontintilo. Aio premis butonon sur saltbloko, kaj sur la mura ekrano aperis virino elegante vestita: super ŝia kokso ŝin vestis plasta jaketo, en la flortruo, super la flankpoŝo, sidis gladiolo. Ĉirkaŭ ŝia kolo troviĝis ĉeno el saturnio, t. e. el la 128-a elemento, sed ĉi tiu estis longdaŭrigita. Tamen ĝia duoniĝa tempo jam pasis kaj tio videbliĝis per la rimarkebla maldikiĝo de ĝiaj fadenoj. Ŝiaj suoj estis el natura ledo, kio vekis miron kaj envion. De la genuoj, super kiuj du pantalontuboj estis alligitaj per rimenoj, ĝis la kokso estis nenio. Tio estis la modo.

Kelkaj aplikis la rimenojn sub la genuoj kaj la genuojn senhonte lasis nudaj, sed kio ne decas, tio ne decas, ĉi tiu mismodo ne venkis: la publika gusto rifuzis troan ekshibiciismon. Aliparte, oni ne povis tro miri pri tio, ke la iamaj virinoj kovris ĝuste siajn plej interesajn partojn. Al viro tio ja konvenas, ĉar la malkaŝa montrado malkovrus certajn statojn de ekscitiĝo.

Aio, ekvidinte la virinon, diris al Eo timiĝinte;

— Nu jen, aperis la diablo, kiun vi pentris sur la muron. Tuj kaŝu vin! Uiea estas ĉi tie kaj faros al vi am-agreson.

— Kaj vi?

— Kion fari, se ŝi telefone min serĉas? Vi scias ja, kiel agresiva ŝi estas kontraŭ ĉiu bonstatura viro!

— Diru al ŝi, ke vi estas honesta viro.

— Senvalore! Vi konas ja la perfortemon de la virinoj!

— Kial miri pri tio? Tio rezultas ja el la biologia naturo de la seksoj: jam unu sola kiso povas ĉifonigi viron, dum Messalina laŭ la tradicio, eltenis la kisojn de cent sepdek viroj. En unu serio.

— Ni ne forbabilu la tempon, ĉar ree okazos skandalo. Rapidu sub la ekranon!

Eo rampis sub la ekranon kaj tie kaŭrante sin kaŝis en ombro kaj muto.

Aio premis alian butonon, kaj sur la bildo Uiea tuj turnis sin al li, ekparolante:

— Nu, fripono! Mi jam pensis, ke vi ne volas min akcepti.

— Mi dormis, koreto Uiea.

— Sufiĉe profunde! Kio al vi? Ĉu mi povas vin viziti?

— Mi timas, ke mi infektos vin per gripo.

— Haha! Kiel ĝentile! Bonega preteksto min forskui! Sciu, ke mi jam tre malsatas pri vi kaj nun vi ne evitos min.

— Sed vi infektiĝos.

— Des pli frue mi resaniĝos. Do, ĉu mi povas iri?

— Mi ankoraŭ ne fartas bone.

— Ne tia vi aspektas. He, Aio! Mi jam delonge suspektas, ke vi elamiĝis. Atentu, ke via kolo ne estu eltordita!

— Sed, mia koreto.

— Nenia koreto! Vi jam foje diris rekte kaj ronde vian malplaĉon pri mia nova kapo.

— Tute male. Ĝi eĉ plaĉas ege!

— Mi ĝojas, ke vi dividas mian guston.

— Mi diris, ke ĝi estas tre bela. Eble eĉ tro. Mi havas la senton, ke mi perdis vin per tio.

— Tio, kion vi ĝuas en mi, estas la malnova.

— Vi eraras! — diris Aio ruĝiĝante. — Milfoje mi diris, jam ankaŭ al via nova kapo, ke mi amas vian animon. Kaj laŭ la kapo-leĝo, vi devus havi la nomon de via nova kapo. La homo estas la kapo mem, do vi devus havi ties nomon, kies kapo estas muntita sur vian korpon. Mi enamiĝis ne al ĉi tiu kapo. Mia antaŭa amatino estis delikata, ĉarma estaĵo.

— Ho, la sentimentuleto! Mi do ne plaĉas? — ŝi demandis minace.

— Vi plaĉas, eĉ tre! — li klopodis lin pacigi time. — Sed mi volus almenaŭ scii vian nomon.

— Mi jam diris, ke la malnova kapo-posedanto mortis kaj mi, laŭ la sama kapo-leĝo, ne rajtas porti ŝian nomon por evito de heredaj komplikaĵoj. Mi havas do la nomon de mia korpo.

— Kaj la nomo de via kapo?

— Ankaŭ ĝi estas Uiea. Laŭ la kapo-leĝo.

— Mi serĉos ŝin.

— Nu, eble vi trovos iun el la multaj Uieaj. Sed ties kapo estos rompita kune kun la via! Notu tion bone!

— Sed ŝi mem. Kie estas ŝi mem? — demandis Aio, rompite.

— Mortis, mi jam diris tion. Ripozu ŝia cindro, mi povus diri, sed eĉ cindroj ne postrestis en la atom-transformilo. Kelkaj partoj tamen estis transplantitaj, eble ŝian dekstran piedon vi ekvidos ie paŝadi sur la strato. Sed, jen vidu ŝin.

Ŝi malfermis medalionon pendantan sur sia saturnia ĉeno kaj montris la internan portreton.

— Sed ĝi estas senkapa kadavro! — teruriĝis Aio.

— La kapon vi vidas sur mia trunko. La cetero disperdiĝis, sed meritas, ke mi gardu ŝian portreton. Sed kio estas tio! — ŝi kriis kaj montris antaŭen.

— Kio?

— La fumo antaŭ la ekrano! Iu cigaredas tie!

— Ho ne, neniel, koreto! — rapidis klarigi Aio. — Nur vaporo de teo ĝi estas. — Kaj li ne kuraĝis signi al Eo, sed tio estis ja senbezona, ĉar Eo jam estingis la cigaredon kaj ŝrumpis en spasman silenton.

— Mi pensis, ke Eo ĉeestas. Jen la sola viro, pro kiu mi lasus vin trankvila.

La timo de Eo estis komprenebla: Uiea nun tradibuĉis la sunsubiron de sia juneco, vivante la danĝeran aĝon en sia 86-a jaro. Tial ŝi algluigis al si novan kapon kelkdek jarojn pli junan. Per konstanta pelĉaso je viroj, ŝi amasigis siajn viktimojn, kiuj ŝin nomis Donna Juana.

Aio ĉiamaniere klopodis deflankigi la konversacion.

— Ĉu vi havas ian bonan legaĵon.

— Hodiaŭ mi pruntis ion el la Humura Libraro, por vin distri en via malsano.

Ŝi malaperis de la ekrano kaj tuj revenis kun libro. Ŝi montris la titolon: »Kiel ili imagis«.

— Jen, vidu. Esploremulo kompilis libron pri tio, kiel la sciencaj fikcioj de la dudeka jarcento imagis nian epokon. Harstarigaj stultaĵoj! Jen ekzemple novelo de Stanislav Lem! Sed la kulmino estas ĉi tie: »La revoj de Sándor Szathmári«. Kia melonkapulo! Li skribas ekzemple, ke niaj virinoj portas de la genuoj ĝis la kokso nenion.

Nun Aio vere devis laŭte ekridi.

— Kaj ĉu ili ne frostetas vintre?

— Eĉ somere la korpo bezonas ŝirmon. Kompreneble, la kompatindulo eĉ palan konjekton ne havis pri tio, ke ni portas travideblan kalsoneton el plasto. Tiu laikulo imagas, ke kio ne videblas, tio ne ekzistas.

— Haha! — ridis Aio. — Eĉ pli grandan stultaĵon li imagis.

— Kiel do, ĉu vi legis lian libron?

— Ne. Sed el viaj vortoj sekvas, ke li parolas pri ni kiel pri ekzistantaj homoj, eĉ ne konjektante, ke en la tria mondmilito la homoj eksplodigis la teron disen en la kosmon, do ni tute ne vivas.

Popolkanto

(Megrakjàk a tüzet)

Fajron oni metas,
kaj cindriĝi lasas.
Ne ekzistas amo,
kiu ne forpasas.

Amo, vi, turmento,
plago de l'destino,
kial vi ne kreskas
sur ĉiu branĉfino!?

Metu, kara, fajron,
blovekscitu flamojn,
por ke mi varmigi
povu miajn manojn.

La jarfinaj kutimoj montras miksiĝon de pagana kaj kristana mistikoj kun la ludemo de la popolo. El la multaj jarfinaj ludoj ni prezentas nun tri.

La seĝo de Luca, *la 13-an de decembro, devas esti farata el 9 diversspecaj lignoj ekde la tago Luca ĝis Kristnasko, ĉiutage oni »laboras« iom sur ĝi kaj se la »majstro« dum la noktomeza meso sur ĝi sidas, li povas agnoski en la preĝejo la »sorĉistinojn« de la vilaĝo . . .oni kredis kaj diris iam, sed hodiaŭ jam neniu kredas, ke tiaj ekzistas. — Aŭ ĉu tamen? Vidu la bildon: en la vilaĝo* Bajna, *la junuloj en maskerado promenante sur la stratoj — serĉas la belajn sorĉistinojn . . . de sia koro.*

Antaŭ Kristnasko estas la misterio-ludo: oni prezentas kante, drame, eĉ dance la historion de Jesuo en Betlehem, miksante en ĝin paganan ceremonion pri la vintra solstico (sunturniĝo). La bildoj montras: Virinoj kun lulilo — simbolo de naskiĝo — vizitas la familiojn en la vilaĝo. La alia bildo montras la »popolon«, la »Tri Reĝojn«, ktp, laŭ fantazio el la tempo de la unua »Kristnasko«.

En la unua minuto de la nova jaro la fraŭlinoj estas tre scivolaj, kion portos por ili la futuro: do, ili versas plumbon en akvon, kaj kion ĝia formo montras . . . tio sekvos. Espereble ĝi similas al la vizaĝo de la amata viro . . .aŭ ĝi montras la formon de ia bebo? Ĉio povas okazi.

Valeria Szabó



HUNGARAJ POPOLKUTIMOJ

Kongreso de junaj muzikamantoj

En ĉi tiu jaro la Muzikema Junularo (Jeunesses Musicales) aranĝis sian internacian kongreson en Budapeŝto. Ĉi tiu fakto montras unuavice, kian altan rangon havas en la tuta mondo la hungarlanda muzikeduka sistemo, fondita de la hungara komponisto kaj muziksciencisto *Zoltán Kodály*. Ĉi tiu evento estis samtempe omaĝo al la ĝisnuna prezidanto de la movado, sinjorino *Magda Szávai*, hungara muzikisto, kiu tre aktive kaj fruktodone laboris por progresigi la tutan movadon kaj protekti ĝian celon: disvastigi la muzikan kulturon kaj kune kun ĝi la estetikan kaj etikan nivelon de muzikemaj gejunuloj en la tuta mondo.

»En la arto la bono kaj la belo ne doniĝas per si mem: necesas multe da fortostreĉoj por ĝin atingi. La *Jeunesses Musicales* volas plifaciligi ĉi tiun fortostreĉon kaj fari ĝin ĝenerala forto, por ke ĝi helpu la noblan lukton, kaj atingi, ke la konstante ampleksiĝanta libera tempo estu fonto de ĝojo kaj de feliĉo, kaj ne fonto de malprogreso.«

Jen la enkondukaj frazoj de la kongresa libreto, eldonita en du lingvoj: hungare — do en la lingvo de la kongresa lando, kaj france — en la ĝis nun akceptita oficiala lingvo de la movado.

La kongreso, kiun partoprenis la junaj muzikamantoj kaj samtempe la junaj profesiaj muzikistoj, plejparte instrumentaj interpretantoj, estis vere tre efika. Mi pensas, ke antaŭ ĉio tial, ĉar la registaro de Hungario subtenas la movadon, kaj per tio la celojn de la junaj muzikamantoj de la mondo. La malferman kunsidon de la kongreso partoprenis la kultura ministro de Hungario per altnivela enkonduka parolado.

La internacia movado de la junaj muzikamantoj kaj profesiaj muzikistoj fondiĝis en la jaro 1946 en Belgujo. La muzikeduka sistemo de Kodály, pli kaj pli alloganta al Hungario multajn muzikistojn, ĉefe pedagogojn el ĉiuj kontinentoj, havis jam bonegajn rezultojn. Karakteriza estas la indiko, ke en Hungario en la jaro 1968 preskaŭ 80.000 koncertaj lu-biletoj estis vendataj al junaj muzikaŭskultantoj kaj preskaŭ 1000 koncertoj estis aranĝataj aparte por la junularo. En la lasta jaro ĉiu dua koncerto en Hungario estis dediĉata al la juna publiko.

En Hungarlando la movado de la junaj muzikamantoj do estas alte evoluinta afero, sed fakte la hungara organizaĵo alkroĉiĝis nur en 1965 al la internacia centro. De tiu tempo la hungarlanda movado de la junaj muzikemuloj evoluis eĉ plirapide ol ĝis tiam.

Kompreneble estas, ke ĉiu muzika manifestado en nia lando estas ligita al du mondfamaj hungaraj komponistoj kaj muziksciencistoj: Béla Bartók kaj Zoltán Kodály, kies nomojn oni konas ĉie, kie oni ludas, aŭskultas kaj ŝatas la valoran muzikon.

Ankaŭ en la ĉi-jara kongreso de la *Jeunesses Musicales*, ree kaj ree aperis la nomoj kaj la spirito de ambaŭ hungaraj komponistoj, granduloj de la internacia muzikhistorio.

Dum la kongreso doniĝis eblo por la junaj muzikinterpretistoj montri sian talenton: sub la titolo *Podio de junaj artistoj* kvar koncertoj estis aranĝitaj.

Unu el la plej interesaj kaj kortuŝaj momentoj de la tuta kongreso estis la koncerto de la *Internacia orkestro*, kies membrojn oni varbis el inter la interpretistoj, partoprenantaj la kongreson. La hungara muzikestro mem diris dum persona interparolado, ke li devis doni siajn instrukciojn en kvin lingvoj.

La membroj de la Internacia orkestro malgaje preparis la debuton, bedaŭrante, ke la ensemblo tuj post la koncerto disiĝos kaj neniam en la vivo povos refoje roli. Eble ĉi tio estis unu el la kaŭzoj de la kongresa decido, formi konstantan internacian orkestron.

Min, kiel esperantiston nature tre interesis la lingva rilato de la internacia kongreso: la malfacilaĵoj pro manko de unueca lingvo. Unue, ne-muzikisto apenaŭ povas bone traduki tekston pri muzikaj temoj. Due, la movado havas nur unu oficialan lingvon — la francan. Oni faris la proponon, akcepti ankaŭ la anglan lingvon, kiel labor-lingvon sed la kongreso ne povis tiasence decidi, — ĉar tio ŝarĝus per konsiderinda kromelsprezo la kongresan fondumon, tiel multe kostas la diversaj tradukoj. Bedaŭrinde mi ĉeestis la kongreson nur kiel aŭskultanto, mi do ne havis rajton alparoli, fari la proponon — uzi Esperanton oficiale krom la naciaj lingvoj.

Finfine: la kongreso estis granda sukceso de la humanisma rolo de la muziko en la vivo de la homo kaj triumfo de la nun jam mondfama hungara muzikeduka kulturo. Ĉi tion pruvis la nombro de partoprenantoj: proksimume 900 kongresanoj el 25 landoj.

Lajos Lesznai

LA 2a APUD-DANUBA FOLKLORA DANCFESTIVALO

Fine de la somero bonsukcesan aranĝon organizis en urboj Baja, Kalocsa kaj ĉe la bordo de lageto Szelid, la Departementa Konsilantaro de Bács-Kiskun. La renkonton partoprenis 31 amatoraj popoldancgrupoj el ses apuddanubaj landoj (GDR, Slovakio, Jugoslavio, Rumanio, Bulgario kaj el Hungario). En la programoj ili prezentis siajn ankoraŭ vivantajn dancojn, popolkutimojn, ludojn. La dek infangrupoj tute aparte rolis en Kalocsa. La partoprenantoj provis ĝui la prelegojn de d-ro Gyula Ortutay, akademiano kaj de la poeto Mihály Váczi.

En Baja renkontis sin la Majstroj de Popolarto kaj amase estis vizitata la »Aleo de popolartistoj«, kie oni vidis la artistojn mem dumlabore kaj iliajn produktaĵojn. En Baja kaj en aliaj urboj oni malfermis multajn ekspoziciojn, kies temoj estis pri la popolarto.

La renkonto krom la fakaj sukcesoj bone servis la aferon de la amikeco inter la popoloj vivantaj apud la riverego Danubo.

Tamás Szlanka, Kecskemét

LA HUNGARA UZINO DE OPTIKAĴOJ

Budapest 114. Pf. 52. Telex: 259.

Produkta sortimento:

Geodeziaj instrumentoj
Laboratoriaj instrumentoj
Vitrofadenaj medicinaj instrumentoj
Periferiaj unuoj de komputeroj
Okulvitro-lensoj
Okulvitro-garnaĵoj
Fluid-mezuriloj
Vekhorloĝoj
Optikaj iloj
kaj aparatoj
Diversaj
mezuriloj
kaj kontroliloj

László Nagy: Memportreto

LÁSZLÓ NAGY (nask. 1925), unu el la plej talentaj kreantoj de nia nuntempa poezio, preparis sin pentristo — ĝis nun oni trovas liajn portretojn desegnitajn pri liaj poetoj-kolegoj en niaj literaturaj gazetoj — sed la signifa parto de lia artkreado estas la poezio. En lia liriko alojiĝas pasieco, pensriĉo, moderna problemismo, turmentaj vizioj, efiko de folklora poezio kaj de muziko. Liajn poemojn oni tradukis plurlingven. Li estas eminenta ankaŭ kiel tradukartisto per la interpreto de bulgara popolpoezio, de Burns kaj de Garcia Lorca. Dotito de Kossuth-premio.

MARGIT SZÉCSI (nask. 1928), edzino de László Nagy, per la originalvočaj, moderntonaj, kurioze flagrantaj poemoj elluktis por si respektindan lokon en la nuntempa hungara poezio. Dotitino de Attila József-premio.



László Nagy: Mia edzino

LÁSZLÓ NAGY

HIMNO EN ĈIUJ TEMPOJ

Ho vi, ĉielarkbrovulin,
Sunlumidin de flama sin',
Fajlil diamanta de lancfin,
Vi, delic mia, min helpu!

Paŝtist de najtingala ĥor,
Liutisto de tagmeza or,
Palac unua el marmor,
Vi, delic mia, min helpu!

Daktil en valo de mizer,
Pentraĵe kaŝridet-mister,
Kupolo ora de preĝej,
Vi, delic mia, min helpu!

Gajni vipata kurĉeval,
Standardo en ribelbatal,
Stel gvata tra prizona bar,
Vi, delic mia, min helpu!

Doktor de vundoj de milit,
Hejmo de senpatrujigit,
Miela vino, dolĉa mit,
Vi, delic mia, min helpu!

Dormemulin de vendohal,
Dancisto de mizero-bal,
Silvestro-nokta kornfanfar,
Vi, delic mia, min helpu!

En beta-radiaroj trema,
Multkapajn idojn forĵetema,
Markrestojn brubatante rema,
Vi, delic mia, min helpu!

Ĉiam konata, sen sekret,
Benata per esper-graved,
Per die forta ĉarm-posed,
Vi, delic mia, min helpu!

Min de eterne brakprenanta,
Kun mi kusenen sin klinanta,
Kornikojn kadavriĝi kanta,
Vi, delic mia, min helpu!

Se de horor min kaptas sven,
Se min alblekas senhontem,
Se mi batalas kun mi mem,
Vi, delic mia, min helpu!

Se rajto, ĝi stas mia prav,
Ĉiu potenco — mia hav,
Mi armas min per kasko, glav,
Vi, delic mia, min helpu!

Mia kortego brilfajreras,
La sango, fulgo glorfieras,
Kolomboj miaŝultra kveras,
Se, delic mia, vi helpas.

MARGIT SZÉCSI

LA EKFLORINTAJ MANOJ

Kiu min turnas en la brilanta Spaco?
Kiu mian sangon per radioj plenplenigas?
Kio kuntajlis mian eston kun la Tempo ĝin briliganta?
Kio al ĉi vip kaj estro de mia sort galopa min ligas?

Mi, pita pomet boardanta inter la buŝoj del tero,
fervora evitanto de ĉiu gorĝ avidmanĝa,
volanta tiel aparteni al la Forpaso, ke el ĝi
disradiu astroarbo multfronda-multbranĉa.

Kaj vi, komprenanta la grandiozon de ĉi danco deva,
scianta, ke el via am al mi flamanta nul vaniĝas sen rikolto,
ĉar mia mort estas venk super mort kaj sublima kiel la patrina,
venu kun mi danci ĝis en la morto!

Vizaĝ beata de ŝton kaj glacio min gvatas de eterne.
Mi dormas: la kusen de miaj ostoj estas ostoj de sombra hordo,
sed reviviĝos la prauloj, se moviĝos mia talio:
venu kun mi danci ĝis en la morto!

Elsidiĝas la flagraj okuloj en kraniokavojn,
kio stas larvo, tion haŭt benata surkreskas laŭ ordo,
kuproringegoj tintas, aplaŭdas la ekflorintaj manoj —
venu kun mi danci ĝis en la morto!

Hurlas la panter arbustara, atakus kaj ne kuraĝas,
ĝia blonda barbo tremas nervoze, la dentoj knakas por mordo,
ĉirkaŭ nin altiras la monstrojn la karn belega —
venu kun mi danci ĝis en la morto!

Maturiĝas ĉio, ankaŭ la ŝtorm en la ĉieloj;
fulmotondras, kvazaŭ metal-gitaron oni batus krude,
grandaj gutoj pluvegaj kiel antikvaj arĝentmoneroj
pagas por terproduktoj, la tero kuŝas nude.

Jen, el la kampoj subite elkreskas la urbo,
sur tegment-prismoj de nubskrapuloj kuŝas la nub surventre,
supre, supre la impetaj flugiloj de ventokokoj
fridiĝas en kosma blov kaj klakas elokvente.

Mi, kiu rompe eskapis del mizer, por forrabi
Eŭropon, mi, virina apaĉ del mondo,
sur la plej altan tegmenton mi fiksos mian flagon —
venu kun mi danci ĝis en la morto.

Dolĉon, amaron mia sang enkolektis, mi riĉas,
kvankam apenaŭ stas al mi mon por vestado del korpo.
Mi turniĝas kiel ventbirdo laŭ turnvento de muzikoj novaj —
venu kun mi danci ĝis en la morto.

Ne voradis mia esto, grason sur sin ne akaparis,
mia vivrendevuo stas nura fidel, honesto, ten de vorto.
Mia korpo, kiel la anim, ankoraŭ stas magra pro idealoj —
venu kun mi danci ĝis en la morto.

Niajn grandajn noktojn mi sonĝas plenaj de vivantoj,
de puraj koroj, kaj ni giras kun ĉi eskorto
sonĝe-fluge en la astra spaco de la fekundo —
venu kun mi danci ĝis en la morto.

Senindulgas la temp, en ĝia vent aŭstera
rulataj gigantaj glornimboj paliĝas sen forto,
sed la lum de mia vizaĝo sendefenda ne ĉesos —
venu kun mi danci ĝis en la morto.

Trad. K. Kalocsay

Esperanto kiel peranto en kulturaj interrilatoj

Estu permesate prezenti (kaj intervjui) S-ron Pat O'Reilly, irlandan esperantiston, kiu vizitis Hungarion je invito de la Hungara Instituto Por Kulturaj Interrilatoj. Jam la kvaran fojon li estas en Hungario, la unuan fojon li reprezentis Irlandon en la 51-a Universala Kongreso de Esperanto.

»*Kio portas vin re-kaj refoje al Hungario*«

»Estas pluraj kaŭzoj. Antaŭ ĉio la hungaraj amikoj esperantistaj, krome: Hungario havas por alilandanoj multe da belaĵoj. vidindaĵoj, precipe Balaton-on, la ,,Hungaran Maron", kiun ĉiuj vizitantoj devus vidi kaj ,,gustumi"«.

»*Kio estis la antaŭaĵo de via nuna, oficiala vizito?*«

»Dum la ĉi-jaraj paskaj festoj ni, irlandaj esperantistoj, aranĝis la 52-an Britan Kongreson de Esperanto en Dublino, la ĉefurbo de Irlando, al kiu ni invitis, pere de la Hungara Ambasadejo en Londono, ankaŭ hungaran esperantiston. La Hungara Instituto Por Kulturaj Interrilatoj sendis sian kunlaboranton al la kongreso, kiu fruktuzis sian restadon en Dublino por iniciati kulturajn rilatojn inter Irlando kaj Hungario.«

»*Ĉu la reprezentinto de la Instituto estis sukcesa?*«

»Sendube! La Instituto invitis du kunlaborantojn de la irlanda Televido al Hungario por studvojaĝo, kaj la hungara sendito interkonatiĝis kun reprezentantoj de irlandaj oficialaj instancoj Estas kompreneble, ke dum la paskaj festoj li povis fari nur la unuajn paŝojn. Daŭrigi la komencitan pritaktadon, la Instituto invitis min. kiu volonte servas kiel peranto inter la Instituto kaj la koncernaj irlandaj instancoj.«

»*Pri kio vi pritraktadis en la Hungara Instituto Por Kulturaj Interrilatoj?*«

»Pri subteno al tradukoj konigantaj la pasintan kaj nuntempan vivon de la alia lando, pri vizito de irlandaj eminentuloj de la kultura kaj scienca vivo al Hungario, pri interŝanĝo de ekspozicioj kaj pri la rolo, kiun la Internacia Lingvo povas havi en kulturaj kaj sciencaj interrilatoj.«

»*Ĉu vi opinias, ke Esperanto povas helpi kulturajn rilatojn inter landoj kaj popoloj?*«

»Memkompreneble! Ĉu ne estas bone, ke ekzemple estontaj vizitantoj oficialaj povos fruktuzi sian scipovon de Esperanto en Hungario? La Instituto Por Kulturaj Interrilatoj havas interpretistinon, kiu parolas ankaŭ Esperante. La unuaj paŝoj sur tiu vojo estas jam faritaj. Ni laboru kune por la disvastiĝo de Esperanto en ĉiu tereno de la vivo.«

Erika László

Noto por la legantoj

Mi ne metis apostrofojn en la du poemoj tradukitaj anstataŭ la eliziitaj o-finaĵoj de substantivoj. Jene mi emfazas, ke tio estis ne forgeso, sed intenco. Ĉar:

1. La afero ne estas senprecedenca. Vilno Setälä en sia libro »Fortoj de l'Vivo« plurfoje faras tion, ekzemple sur paĝoj 89, 90, 91, 92, kaj, laŭ mia scio, sen ia skandalo.

2. La afero ne estas kontraŭ-Fundamenta. En la Fundamento nome estas skribite, ke »la fina vokalo de la substantivo kaj de la artikolo povas esti forlasata kaj anstataŭigata de apostrofo«. Atentu: »povas esti«: Do la anstataŭigo tiel same nur *povas* (ne: *devas)* esti, kiel la forlaso. Ne estas skribite: »povas esti forlasata, sed tiam ĝi devas esti anstataŭigata . . .«.

3. Sincerdire, mi timis pri la prestiĝo de E-o. Se la poetoj, kies poemojn mi tradukis, vidos sian kreaĵon plenŝutita per tiuj multaj ' ' ' ' ' ' ' ', ili diros, ke E-o ŝajne estas ia arkaika lingvo.

4. Fakte, la teksto multe pli bone aspektas sen tiuj »fiŝostetoj«. Tiamaniere oni povas rehabiliti la ellason de la o-finaĵo, kiu, ekde la malfeliĉa agitado de Brendon Clark, ofte estis jam rigardata kiel nepardonebla peko.

K. Kalocsay

Vojaĝo en Italio

En la lastaj jaroj ĉiam pli multe da homoj staras en vico ĉe la pasportoficejoj, por povi pasigi sian libertempon ie en eksterlando.

Jare duonmiliono da hungaroj vojaĝas al eksterlando kaj ankoraŭ pli multaj eksterlandanoj venas al ni, por plezuri en belaj pejzaĝoj kaj urboj, por intersanĝi la maron por la pli mildaj sed pli varmaj ondoj de Balatono.

Mi iris al Italio, por pasigi tie dek kvin admirindajn tagojn. Ĉu admirindajn? ... Jes, ili estis neforgeseblaj, ĉar en Torino min atendis mia esperantista amiko kaj korespondanto Vittorio Canavero, kiu montris al mi la urbon, kaj la ĉirkaŭajon de Torino, — tiel do tiuj tagoj estis por mi vere admirindaj. En Torino mi restadis nur kvar tagojn, sed mi memoros ĉiam pri tiu tempo. Tiujn tagojn igis memorindaj la esperantista interrilato, la sincera amikeco kaj helpemo de la tieaj esperantistoj, kiujn mi renkontis dum mia vojaĝo. Igis ilin memorindaj Carmen Topi, ĉar Vittorio, Carmen kaj mi multe interparoladis kune pri la nova Hungara Vivo, kies unuan numeron ili jam konis kaj tiom aprecis, ke ili proponis disvastigi ĝin en Norditalio kun centro Milano.

El Italio mi povis vidi malsufiĉe, ĉar dek kvin tagoj estas malmultaj, por ke oni povu vojaĝi ĉien. Sed krom miaj daŭraj travivaĵoj en Romo, Firenze, Venecio mi kunportis ankoraŭ ĝojigan — por mi novan — malkovron. Nome tion, ke havante la Esperantan lingvon, nenie en la mondo mi estas sola, ĉar kun la helpo de Esperanto ĉie mi trovas amikojn, kun kiuj ni povas kompreni unu la alian en maniero inda al la homo de nia epoko. Tio estas multvalora vojaĝdonaco, kaj mi deziras, ke ĉiuj miaj samtempuloj, vojaĝantaj al eksterlando, alvenu al tiu ĉi rekono.

József Szekeres

TURISMO

estas la alloga ŝildo sub kiu milionoj penetras pace en aliajn landojn. Amase estas provizore forlasataj hejmoj, precipe dum feriaj sezonoj, por ĝui veturadon, aliajn ĉirkaŭaĵojn, plezurojn, kiujn ofertas somero aŭ vintro. Nek legantoj de libroj aŭ revuoj, nek rigardantoj de filmoj pri aliaj landoj povas ricevi tiajn travivaĵojn kaj konojn, saturitajn de emocioj, kiajn akiras la persona vizitanto. Jam ne malgranda parto de la homaro inklinas ekkoni trans sia pejzaĝo landojn kaj homojn. Sed ĉu ili sukcesos?

En nia babela mondo apenaŭ indas respondi je tiu demando. Ĝuste tiujn lingvajn barojn, kiuj lasas koni nur la surfacon, devas rompi pli energie la Esperanto-turismo. Superflue diri, kiom pli da homaj valoroj, konoj, amikecoj donas tiu ebleco, verdire ĝi estas *maniero* de turismo alia ol la kutima: pli riĉa, pli rava. Ke ĝi estu ankaŭ *pli alloga por amasoj*, multe dependas de nia movado, de la konvenaj formoj, kiujn ni prezentas por la amasoj.

Bonege atestas tion la multjaraj sukcesoj, ankaŭ la ĉijaraj (6—12. Julio) de la

Somera Esperanto—Universitato en Gyula,

cetere nun la unuan fojon aranĝita sub egido de la hungara Scienc-populariga Asocio. »*Kiom multe da tempo vi ŝparas!*« — miris landa sekretario de tiu grava asocio, sed je la fino li jam tute ne miris, kiam li aŭskultis la ekzamenojn pri la studitaj dek internaciaj prelegoj. »Niaj aliaj someraj universitatoj perdas ege da tempo pro tradukadoj en 3—4 lingvojn« — aldonis la multsperta funkciulo — »ĉi tie ja eblas igi profunda la scion, eĉ ekzamenadi!« La celkonscia konstanta agado de SEU akiris gravan aprobon: akademiano *Gyula Ortutay*, prezidanto de la asocio mem inaŭguris ĝin per parolado al la 150 partoprenantoj, el ok landoj. La ravaspekta urbo de parkoj kaj banejoj gastame akceptis la scivolemajn vizitantojn de tiu altnivela, interesa kunveno.

El movada vidpunkto aparte grava sin montras de jaro al jaro la

Internacia Pedagoga Esperanto—Seminario en Szeged (10—12. Augusto), kies moderna hejmo estis preskaŭ plena de la 200 lernemuloj el 12 landoj. Karavano venis el Bulgarujo, kaj oni venis ankaŭ el la fora Japanujo kaj Anglujo. Edukaj prelegoj kaj kursoj levis la lingvo-scion, instruis la metodojn de kursgvidado. La partoprenantoj estis fervoraj: 50 el ili sukcesis en ekzamenoj A, B, kaj C. La milda vetero donacis belajn vesperojn, kaj kreiĝis bonsukcesaj amuzaj programoj en internacia etoso, se ne paroli pri la Tragedio de l'homo kaj aliaj animagordaj prezentadoj de la grandioza subĉiela teatro apud la majeste fluanta Tisza.

Ŝajnas utile kaj por la publiko, kaj por la organizantoj se renkontoj, turismaj aŭ fakaj ripetiĝas. Tion pravigas la ĉijare jam la duan fojon organizita

Internacia Renkonto de Esperantistoj—Naturamikoj (IREN) en *Abaliget* (14—24 Julio). Inter mildaj arbaraj deklivoj kaj lagetoj de la mediteraneca montaro Mecsek, internacia aro de naturamikoj ĝuis la belegan ĉirkaŭaĵon dum bone organizitaj ekskursoj kaj distraĵoj. »Emociplena ferio inter amikoj« — emfazis adiaŭante malnova naturamiko, venkinta jam multajn montpintojn, — »oni devas aranĝi multajn tiajn«.

Kun diversaj celoj ekveturas la homoj, nia movado devas jam forte adaptiĝi al tiuj diversaj deziroj, kaj *organizi pli kaj pli diversformajn, laŭcele aranĝitajn kunvenojn, renkontojn, karavanojn* en- kaj eksterlanden kun altnivelaj programoj. La grandaj someraj renkontoj — inter ili la centro, la *UK en Helsinki* — jam pasis; *sekvu* ilin analizado kaj preparo de novaj ! Dank' al la fervoraj organizantoj, oni jam planas *venontjare denove aranĝi* la supre menciitajn sukcesajn Esperanto—renkontojn. Tutcerte altiros grandan parton de kongresanoj de la UK en Vieno — kaj ankaŭ aliajn — la *Postkongreso 1970 en Budapeŝto*, memoras ja tre multaj pri unu el la plej sukcesinta kongreso: Budapeŝto, 1966.

Ervin Fenyvesi

Vivi kiel esperantisto

(Okaze de la 75-a naskiĝtago de Paŭlo Balkányi, je peto de la redakcio la aŭtoro skribis la sekvan artikolon.)

„Esperantisto iu ne fariĝas, sed naskiĝas!" — tiel esprimis sin foje mia ĉiama amiko Baghy. Li volis per tio esprimi, ke oni kunportas la animon, la menson, kiuj destinas iun konatiĝi kun Esperanto, ekami la ideon de la lingvo internacia, lerni ĝin, klopodi disvastigi ĝin kaj, uzante ĝin en sia persona vivo kaj en sia publika agado, esti fidela al ĝi — ĝis la morto! La saman mi spertis en mia vivo. Estis hazardo, ke mia bona patro foje hejmenportis — ĝuste antaŭ sesdek jaroj — kajereton etan: la dum multaj jardekoj popularan — kelklande eĉ nun vaste uzatan — „ŝlosilon" de Esperanto kun kelkpaĝa gramatiko kaj eta vortaro. Kaj mi — ĉiam multe luktanta kun lingvoj por mi tiom malfacilaj — tuj kaptis tiun kvazaŭ mirindan donacon: fine trovi lingvon, kiun mi — eĉ se kompreneble neniam perfekte — povos lerni.

Mi entuziasmiĝis unue nur pri la relative facila lingvo, sed post iom da tempo studante jam iom pli ampleksan lernolibreton — plej unue tiun de nia ankoraŭ nun vivanta pioniro, d-ro Karlo Mezei — el diversaj tekstoj vole-nevole mi ekkonis, ke Esperanto estas ne nur interpopola lingvo, sed ankaŭ ideo, eĉ idealo por pli bone konatiĝi kun fremdaj homoj, kun malproksimaj landoj. kun diversaj — ĝis nun por ni nekonataj — ideoj, movadoj, celadoj kaj faktoj.

Kaj samtempe la beleco de la lingvo donis apartan ĝuon, paroli ĝin, aŭdi poemojn, kantojn. La korespondado kreis firmajn interligojn kun homoj el ĉiuj partoj de nia tero, ĝi ebligis skribi, sciigi, traduki, eĉ paroli al diversnacianoj, konigi nian landon, esprimi la proprajn ideojn kaj — eĉ vidi presita tion, kion mi kuraĝis skribi, interpreti, konigi almenaŭ por eta parto de la mondo! Por simpla junulo, sen espero pri ia granda kariero, tio signifis la plenumiĝon de jam revata espero.

Ĉar infanoj, junuloj kutimas revi pri io, volas havi ian vivcelon, ion atingi, iel sukcesi, trovi ian realiĝon por esti iu inter la homoj diversaj, — kaj mi ŝajne naskiĝis kun la sento de idealoj, kun deziro helpi, realigi noblajn celadojn. Tiam mi ankoraŭ ne konsciis, ke al la homo donas veran kontentiĝon, feliĉan senton, se li povas ion fari — por aliaj! Nu, certe tian pensadon ne povas kompreni tiu, kiu celas atingi ĉion por si mem, por sia familio, kun havaĵo sufiĉa aŭ eĉ granda, kun regado super aliaj, por atingi altajn postenojn, famon, rekonon kaj riĉan rekompencon de la vivo . . .

Mi ne malkaŝas, ke kelkaj tiaj ideoj ankoraŭ forte vivis en mi junaĝe. En tiutempa taglibreto mi kuraĝis skribi — kvankam konsciante mian malfortecon, nemultan talenton, mankon de persistemo, ne taŭgan materian cirkonstancon —, ke mi dezirus esti fama ŝtat-estro, kiel ekzemple Aleksandro la Granda, saĝa, kiel ekzemple Sokrato, triumfa, kiel en gloraj tempoj Napoleono, verkanto, kiel Jókai, poeto, kiel Petőfi, instruisto, kiel Rousseau, konstruanto, kiel Eifel, kaj bona, kiel Jesuo. Kiu el multaj junuloj ne havis iam tiajn idealojn, ekzemplojn? Kaj kompreneble la pasantaj jaroj instruis min, ke ĉio ĉi estas nur junula idealo — mi ne estas destinita por tiaj altaj atingoj! Sed jen — Esperanto tamen donis al mi el ĉio guteton, ĉefe tion, ke mi povis labori por aliaj, por mia patrujo, por konigi ties teron, ties kulturon multlande, por trabati la murojn inter la lingvoj, por konatiĝi skribe, legante, eĉ persone kun gravaj personoj, kiuj kreis kaj luktis por la samaj grandaj ideoj de la homaro. Kaj mi ellernis, ke mi devas ofte scii pri mia malforteco, por povi rezigni, por toleri malsukcesojn, retiriĝojn kaj tamen ĉiam fidele labori, antaŭen iri, denove komenci, ne heziti kaj trovi en ĉio ĝojon, kontentiĝon, eĉ feliĉon.

En miaj junaj jaroj eble oni tro forte plantis en la lernejoj kaj per legaĵoj la grandan amon al la patrujo. Kaj mi ofte dolore rimarkis, kiel malbone oni konas, ofte eĉ miskonas nian landon. Eĉ en Esperanto-revuoj ĝi estis kelkfoje menciita sub la nomo de Aŭstrio aŭ pli ĝuste Aŭstrio—Hungario. Alilandanoj kelkfoje pensis, ke la hungaroj parolas ian dialekton de la germana lingvo, kaj ne konis ties literaturan kaj artan trezorojn, la sciencajn atingojn. Do kia ĝojo estis por mi en 1912, kiam en tiutempa grava Pariza gazeto, LA REVUO—en kiu konstante kunlaboris Zamenhof mem — aperis miaj sciigoj sub titolo „Hungarlando", eĉ etaj literaturaj tradukoj kaj per helpo de bona amiko — pli sperta literaturisto, ol mi — tuta historio de la hungara literaturo — kompreneble nur sur kelkaj paĝoj ie malantaŭe! Post la unua milito mi povis apud propagandaj kaj instruaj agadoj kun organizaj kaj turismaj preparoj — vaste daŭrigi tian aperigadon en plej diversaj gazetoj — kion mi neniam estus povinta plenumi per iu alia lingvo, vane mi provis kelkajn ellerni.

Ĉion ĉi mi plenumis tiam dum multaj jardekoj, sen ia rekompenco, vidante nur la celon kaj tamen tio donis al mi pli da kontenteco, ol ia riĉa, pompa mondkariero. Eĉ — kvankam mi ne klopodis pri tio — iom mia nomo „famiĝis" kaj kelkfoje mi ricevis senmerite honorojn. — Kaj kiel plilarĝiĝis mia scio, mia perspektivo, miaj mensaj konoj, mi ekkonis movadojn, kiuj eble estus min lasintaj en aliaj laborsferoj indiferenta, precipe la diversaj internaciaj agadoj, la instruoj, doktrinoj de filozofoj, de diversaj religioj, de socialistaj klopodoj, de idealoj kaj bezonoj inter la junularo — por kiu lasta mi provis dum longa tempo iom kunlabori. Mi devas multegon danki al Esperanto, kaj mi konsciiĝis, ke — mi finu denove kun Baghy — en ĝi, sub ĝi, per ĝi vivas kaj vivigas la plej alta idealo, la vera homeco.

Paŭlo BALKÁNYI

RECENZO

FERVOJA TERMINARETO ESP-HUNGARA-ESP

Redaktis: dro István Bácskai, eld.: Hung. Sekcio de IFEF, Bpeŝto, 1968, 144 pĝ., 10×14 cm., fotorepresita.

Pli kaj pli oni insistas ampleksigi la fakliteraturon de Esperanto, rekonante ties gravecon por la disvastiĝo de nia lingvo en la moderna epoko. Tio kompreneble necesigas ellaboron de teknikaj terminaroj. Salutinda estas do la apero de ĉi tiu verketo enhavanta ĉ. 2000 terminojn, kaj farita post longa detala studado fare de hungara fervojista vortarkomisiono. Ĝi certe respondas urĝan bezonon kaj estas ankaŭ valora kontribuo al tute detala, kompleta terminaro farota per internacia kunlaboro. Oni trovas en la libreto multajn zorge detalitajn kaj bone uzeblajn vortgrupojn, plurfoje vere abundajn (ekz-e: ĉe *bileto*, *bremso*, *trako*, *vagono)*. Oni sukcese esperantigis internaciajn konvenciojn pri fervojoj. La terminaro ĝenerale kongruas kun similaj eldonaĵoj. Kelkfoje tamen estus dezirinde elekti pli trafan, kaj precipe pli mallongan terminon, ekz-e anst. »surgluadetiketo«, »relvoj-riverhavena tarifo«, »pintrelpozicia signalilo« (por ĉi lasta, laŭ Duden, pli taŭgus »trakforka signalilo«). La vorton »virko« en la neskribaĵa senco de la germana »Werk« mi ne povas bonvenigi. Sed tiaĵojn certe forpoluros la tempo. La verketo, ni esperas, akcelos la fervojistan fakliteraturon.

TRA LA SOVETA UKRAINIO

1969. Nro 1. — Kievo. Multobl. 52. pĝ. Red. Nadija Andrianova.

La bone redaktita bulteno — montranta la plifirmiĝon de la pozicio de Esperanto en Sovetio — informas pri Ukrainio per varia enhavo. Ni sciiĝas pri tre imponaj nombroj de studentoj en la mezaj kaj superaj lernejoj de la respubliko, pri la grandskala renovigo de la ĉefurbo 1500-jara. La ĉapitro »Esp-kroniko« citas artikolon de grava nacilingva gazeto pri E-pioniro *Oresto Kuzjma*. La entuziasma poemo de *Olesj Lupij* pri franca pacbatalantino plezurigas en la verva traduko de *K. Gusev*. La bultenon eldonis la Ukraina Societo pri Eksterlandaj Kulturrilatoj.

*

PACO — septembro — oktobro 1968 — soveta eldono.

Jen la longe atendita unua soveta numero de PACO, kaj ĝi agrable surprizas per sia luksa ekstero kaj varia, vere leginda enhavo. Preskaŭ ĉiuj sovetaj respublikoj reprezentas sin per io interesa sub la signo de vera internaciismo. Aparte interesas ĉi-koncerne la notoj de japana ĵurnalisto pri *Lenin* el 1918.

Ni ĝuis la originalajn poemojn de *Ludmila Jevsejeva* kaj tradukpoezion ekde mezepokaj poetoj *(Navoj, Rustaveli)* ĝis la latva poetino *Kempe* (brile prezentita de *Elvira Lipped.*) kaj la Majakovskij-paĝo, brave tradukita de *K. Gusev*. La nova traduko de *Onegin* de *Puŝkin*, fare de la bedaŭrata *I. Hoveŝ*, laŭ la presitaj specimenoj ege scivoligas pri la tuto en libro, plezure salutota. Ĝoje ni legis mencion de hungaroj (Endre SIK, Lenin-premiito kaj Stefano BÁCSKAI).

Kiel aldonon al la numero ni povas legi la jubilean festparoladon de L. I. BREĴNEV okaze de la 50-jara datreveno de la granda Oktobra revolucio. Ĝi estas interesa kaj tre instrua legaĵo kaj ĝia presigo en E-o montras esperigan rekonon por la internacia lingvo.

LIBRO PRI LA POPOLA GERMANIO

estis eldonita okaze de la 20-a datreveno de fondiĝo de la Germana Demokratia Respubliko *(GDR Bildoj kaj Faktoj*, eld. Verlag Zeit im Bild, Dresden). Oni ricevas vere multflankan prezenton pri la respubliko sur 250 paĝoj, en plurkolora, bonega preso kun multaj bildoj, desegnoj kaj mapoj. Mallongaj, tute ne tedaj ĉapitroj koncize informas pri geografio kaj historio de la germana lando, priskribas detale la socian kaj kulturan aspekton de la renovigita vivo. La tre belforma libro siaparte kontribuas al la historia kaj morala devo de la germana popolo akceli komprenon inter la popoloj, subteni la porpacajn strebadojn. Ni aldonas: klara stilo, riĉa enhavo vekas la intereson de legantoj.

E. Fenyvesi

A. GAJDAR: DU NOVELOJ (MOSKVO, 1969)

Ĝoje ni salutas la du ĉarmajn infanrakontojn de la fama soveta verkisto. La novelon »Ĉuk kaj Gek« jam delonge konas kaj ŝatas nia junularo, la novelo »R. M. K.« estas tiel same karakteriza pri la aŭtoro kaj ne malpli plezure legebla ol la alia. La simpla kaj travidebla stilo facile legiĝas ankaŭ de freŝbakitaj esperantistoj. La centpaĝa litografita kajero estas vere agrable amuza kun siaj artaj desegnoj. Precipe bele kaj klare tradukis *E. Ostroĵnikova* la novelon »Ĉuk kaj Gek«. La traduko de »R. M. K.« fare de *V. Samodaj* ŝajnas kelkloke arbitre trouzanta la liberecon de la Esperanta vortordo. Kelkaj frazoj aspektas stumpaj; ekz-e: »Trovis kun kiu batali«. Ankaŭ la interpunkciado devus esti pli preciza; la liniofina divido de la vortoj (rako-ntu, retu-rna, ro-mpi) ne servu kiel modelo.

Gabriella G. Nagy

⁎

80 MIL HUNGAROJ VIZITINTAJ LA HEJMLANDON

Dum kvin jaroj kvarobliĝis la nombro de hungaroj vizitintaj el eksterlando la patrion. En la jaro 1965 vizitis la patrolandon 20 mil, en 1968a jaro 70 mil hungaroj vivantaj eksterlande, kaj ĉijare jam pli ol 80 mil. La Mondligo de Hungaroj havis interligon ĉijare jam kun 120 hungaraj asocioj de 20 landoj.

Mondligo de Hungaroj zorgos pri riĉa programo por la hejmenvenantoj. Krom la revivigo de iamaj travivaĵoj kun helpo de Fremdultrafika Organizaĵo *IBUSZ* ĝi kreas eblon, ke la gastoj povu konatiĝi kun la plej novaj establaĵoj de nia patrio. La Federacio cetere planas aranĝi mondan renkontiĝon en 1970, kiun partoprenus pluraj dekmiloj da hungaroj vivantaj eksterlande.

REMEMORE PRI FAMA SCIENCULO

Antaŭ kvin jaroj, en 1964 mortis en sia 66-a jaro Leo *Szilárd*, la hungardevena, mondfama fizikisto, atomscienculo. Li faris siajn maŝininĝenierajn studojn en Budapeŝto, li estis frontmilitisto en la unua mondmilito. Post la falo de la Konsilia-Respubliko li elmigris en Germanion, kaj tie iĝis kunlaboranto de *Einstein*. Poste li transiĝis al Londono. Rezultato de lia scienca laborado en Anglio estis en la fiziko la *efekto Szilárd-Chalmers*. En la jaro 1937 li translokiĝis en Usonon kaj iĝis biofizika profesoro de Universitato *Chicago*. Kune kun Enrico *Fermi* li konstruis *la unuan atomreaktoron*. Kune kun Fermi, Einstein kaj la same hungara Eŭgeno *Wigner* li estis iniciatinto de la ellaborado de plano por la milita uzado de reakcio de urankern-fendado. Li estis gvidpersono de la tielnomata *Pugwash*-movado de scienculoj batalantaj por la interkonsento inter Usono kaj Sovetunio, por la malarmado, por limigo de nuklea armado. De tiu tempo li okupiĝis anstataŭ nuklea fiziko kun molekula biologio.

BABELA HUMORO

Bernard Shaw: »Nenio grava diferencigas la anglojn disde la amerikanoj krom la lingvo, kiun ili parolas.«

*

En la lastaj tempoj la knabo iradas kun morna rigardo. Oni demandis lin:

— Kio estas al vi?

— Mi ne samopinias kun la mondpercepto de miaj gepatroj.

Oho, tio devas esti komplika afero.

— Sed kial?

— Ili punis min, ĉar mi esprimis miajn kontraŭimperialismajn sentimentojn.

— Kaj kiel vi esprimis, ke vi estas kontraŭimperialisma?

— El la angla lingvo mi hejmenportis klasifikon „nekontentiga".

*

En la paŭzo de internacia interkonsiliĝo ĉina interpretisto konfesis al siaj kolegoj, ke li atentas nur la subjekton de la frazoj. Ĉar li scias, ke se temas pri revizionismo, tiun oni devas likvidi, la kolonialismon oni devas neniigi, kaj post la vorto mondpaco kutimas ĉiam sekvi, ke ĝin oni devas defendi.

*

Hungaro vivanta en Svedio ĉi-jare somerumis en Budapeŝto ĉe sia patrino. Li kunportis sian tiean fianĉinon, kiu ne sciis hungare krom kvar aŭ kvin vortojn. Male, la panjo eĉ unu vorton ne sciis svede.

Tamen kun la fianĉineto ili bonege komprenis unu la alian. La panjo parolis kun ŝi malrapide, silabumante, en bongusta hungara lingvo.

Unu tagon la gejunuloj iris al la strando.

— Je la kvina kaj duono ni estos hejme — diris la knabo al sia patrino.

Iom post la kvina ili alvenis hejmen. La panjo akceptis ilin jene:

— Telefonis iu via sveda konato. Je la kvina kaj duono li denove telefonos.

La filo eksuspektis. Eĉ unu svedan konaton li ne havis, kiu povus voki lin hungarlingve en Budapeŝto. Li demandis:

— Panjo, ĉu vi komprenis, ke li vokos min je la kvina kaj duono?

— Kiel mi estus kompreninta, ja li parolis svede!

— Kiel do vi scias, ke li vokos min je la kvina kaj duono?

La panjo ekridetis.

— Kel mi scias? Mi mem diris al li. Bele mallaŭte, silabumante: »Je la kvi-na kaj du-o-no al-ve-nos mi-a fi-lo, ti-am bon-vo-lu te-le-fo-ni.«

*

Dum eksterakomerca traktado bonhumura hungara sendito reciprokis oferton nur ŝajne avantaĝan per »mi ne ĵus descendis de sur la murtapiŝo« (la signifo: ankaŭ min ne estas facile superruzi). La interpretistino tion ne povis traduki en la francan, sed bonŝance subite ŝi ekmemoris pri simila franca parolturno, kiu diras: »Ankaŭ mi venis sur la teron ne kun la lasta pluvo« ...

*

Mario Pei, la renoma Amerika lingvisto kaj granda amiko de Esperanto skribas en sia libro »Neregula lingvohistorio«:

»Unu el miaj onkloj venis en komikan situacion dum iu sia Sudamerika vojaĝo, kiam en restoracio jene li mendis du ovojn kun butero: 'Due uova al burro'. La Argentina kelnero abundvorte klarigis al li, ke la azenoj ne metas ovojn, almenaŭ ne en Argentino.

Kolektis: *Imre Szenes*

Tr.: *T. Ujlaky-Nagy*

La Esperanta Internacia orkestro

starigita en januaro 1969 (Dir.: Jo Haazen, *Lijnwaadmarkt 11. Antverpeno, Belgujo) bezonas jenajn instrumentist-(in)ojn: 5 personojn por unua violono (inkluzive ĉefvioloniston), 5 por dua violono, 4 por aldviolono, 3 por violonĉelo, 1 por kontrabaso kaj 1 por klaviceno aŭ piano. Krome estas bonvenaj 1—2 muzikist(in)oj por fluto, 1—2 por hobojo kaj 1 por fagoto.*

*

La celo de la orkestro estas diskonigi muzikon per E-o kaj E-on per muziko; pliriĉigi i. a. la E-kongresojn, precipe la Universalajn. — Membriĝi povas ĉiu esperantisto kapabla bone *ludi instrumenton, do profesia muzikisto aŭ amatoro eksterordinare bona. — Anonciĝantoj estas petataj prezenti konservatoriajn diplomojn aŭ aliajn taŭgajn atestojn pri kapableco. — Adreson vd. ĉi-supre.*

La ritmo de nia vivo

En unu el la sciencaj diskutoj de la televido estis aŭdeblaj la sekvantaj, tre elokventaj nombroj-indikoj.

Al la duobliĝo de niaj konoj pri la mondo estis necesaj:

de 1800	*ĝis 1900*	*100 jaroj*
de 1900	*ĝis 1950*	*50 jaroj*
de 1950	*ĝis 1960*	*10*
de 1960	*ĝis 1966*	*6 jaroj*

La konkludoj tireblaj el tiuj ĉi ŝokaj, por multaj certe nekonataj faktoj bezonus longajn studojn kaj librojn. Ĉi-loke ni trovas sufiĉa la nuran komunikon, por demonstri ankaŭ helpe de ĝi: kiom laŭtempa estas ankaŭ en nia movado la pli rapida, pli freŝa, pli juneca ritmo, la renoviĝo. Ĉar kion diras la supraj nombroj? — Ne nur, ke la pli granda parto de la konoj kaj metodoj de antaŭ kvardek-kvindek jaroj hodiaŭ jam ne estas aplikeblaj, kaj la tempo transflugis ilin, sed, ke konsiderindan parton ankaŭ de tiuj de antaŭ dek kvin — dudek jaroj same lasis jam post si la evoluo, ja de 1950 jam du fojojn duobliĝis la materialo de la homa kono. Al tiu seninterrompa renoviĝo, al tiu konstanta sinkroneco kun la epoko estas necesaj firma decido, preteco kaj fortostreĉo ankaŭ en nia movado, precipe en la laboro dediĉita por disvastigi la Esperantan lingvon kaj por rekonigi ĝin kiel ĉies internacian lingvon.

LETERKESTO

Al niaj novaj abonantoj. — *Ni ricevis Vian abonon, kaj startigis nian revuon al Via adreso. Ni dankas al Vi viajn konfidon kaj rekonajn vortojn pri nia nova iniciato. Ni havas la decidon daŭrigi la redaktadon laŭ la komencita moderna tendenco, daŭrigi la eksteran plibeligon de nia revuo kaj la pliriĉigon de ĝia enhavo. Estas nia konvinko, ke nure nur tiu ĉi vojo kaj ĉi tiaj strebadoj estas taŭgaj por renovigi nian movadon, por pliigi ĝiajn prestiĝon kaj ŝancojn. Ni kredas, ke per tiu ĉi laboro la renovigita Hungara Vivo gajnos apud siajn malnovajn abonantojn multe da novaj amikoj kaj por si mem, kaj por nia movado. Kaj se ni havas legantojn, kiuj komprenas ne ĉiujn niajn skribaĵojn, ne ĉiujn niajn eksperimentojn je la unua vido kaj unua lego (ekz. la reklamojn, kiuj plibonigas la financan staton de la revuo, kaj tio ankaŭ en Esperantujo estas grava vidpunkto!), ni petas ilin, ke ili akceptu ankaŭ tiujn kun interesiĝo, anticipa konfido, simpatia kaj helpanta kritiko. En longaj interparoladoj kaj diskutadoj ni venis al la konkludo, ke se nia movado volas respondi sian nepre realigendan, ankaŭ hodiaŭ tre modernan baz-ideon, tiam ni devas renoviĝi en nia interna esperantista vivo, en nia movada laborado, sekve ankaŭ en la maniero de nia gazetverkado. Ni devas atingi tiun nivelon, sur kiu troviĝas nun la gazet-verkado, la revuo-redaktado de la unuopaj landoj, por ke ni ne devu honteti kaj nin senkulpigi pro niaj malaltniveleco kaj malriĉaj eblaĵoj. Nur ĉi-maniere ni povos igi nian lingvon kaj movadon altira por la popoloj, por la centmilionoj, kaj sekve de ĉi tio eble pli rapide ili konsciiĝos, ke la homaro fakte bezonas Esperanton, por ĉesigi la malbenitan babelan staton nin akompanantan jam de la pratempoj, kaj por solvi la problemon de la neŭtrala internacia lingvo.*

*

Marie Bartovská, Frydek Mistek, Ĉehoslovakio. En Via letero — lige kun la artikolo »Renoviĝi« en nia n-ro 2/69 — Vi sendas al ni la valoran proponon, ke oni establu mondan centron por la manuskriptoj de fakaj artikoloj kaj verkoj Esperantaj ĉu originalaj ĉu tradukitaj. Tie ili estu registrataj, kaj la listo pri ili disvastigataj. Por interesuloj oni eldonus la kopion de la petita materialo en formo multobligita aŭ presita. Laŭ Vi tio helpus la agadon de la aŭtoroj resp. tradukantoj, kiuj ne verkus plu por siaj propraj tirkestoj, sed por la eventuala uzado. — Jen atentinda ideo, ankaŭ se provizore — niaopinie — ankoraŭ nerealigebla pro financaj kauzoj. — Ni dankas Vian leteron.

*

T. Boersma, Borniastr. 95, LEENWARDEN, Nederlando. — Kun danko ni ricevis Vian leteron kaj ke »Futbalmatĉo« de László Feleki, kiun Lajos Tárkony tradukis en Esperanton, Vi bonvolis traduki en la nederlandan lingvon kaj Via gazeto publikigis la ampleksan novelon en vere reprezentativa formo. Ni esperas, ke en Hungara Vivo ankaŭ poste Vi trovos tradukindajn skribaĵojn, kaj la nederlandaj legantoj pere de Esperanto pli bone povos ekkoni nian literaturon.

*

Al la Redakcio de »Hungara Vivo« — *Sendube ĉiu redakcio ŝatas esti apogata de siaj legantoj aŭ abonantoj. Kvankam mi ekde kelkaj jaroj kun vera intereso abonas kaj legas Vian belegan revuon, tamen ĝis nun Vi spertis neniam kaj neniel — krom la abonkotizo — mian apogon. Sed fine venis la tempo por esprimi ne nur mian plenan aprobon pro la interesa enhavo kaj alta nivelo de Via revuo, sed ankaŭ mian dankon pro la helpo, kiun mi trovis en la 2-a ĉijara n-ro de HV.*

Kiel estro de la metodika centro pri la polaj literaturo kaj lingvo en Krakova distrikto, mi gvidis la dusemajnan porinstruistan someran kurson pri t. n. »fakultativaj okupoj«, kiujn enkondukas la nova instruprogramo en niajn mezlernejojn. Dum la kurso prelegis multaj eminentaj sciencistoj kaj fakuloj. Inter ili mi devis prelegi pri la progresemeco de la instruado, sed mankis al mi sufiĉe da nova, konvena materialo por evidentigi la rapidecon de la ŝanĝoj en la nuntempa vivo kaj la revolucian evoluon de la tekniko kaj scienco. Ĝuste tiam alvenis la 2-a n-ro de H. V., kie mi trovis la artikolon »La plirapidiĝanta tempo«. Mi tuj tradukis ĝin en la polan lingvon kaj detale priparolis dum mia prelego, prezentante samtempe la ekzemplerojn de Via revuo. Mi ne devas aldoni, ke dank'al Via »helpo« mia prelego farigis tre interesa kaj kaŭzis viglan diskuton.

Duan fojon mi »elprofitis« tiun artikolon, kiam mi post la somerferioj prelegis al maturiĝanta junularo, staranta antaŭ la grava problemo: kiun porvivan profesion elekti? al kiu el multaj studfakoj sin dediĉi?

Tute certe mi ne estos apartigita petante Vin pri la plej ofta aperigado de tiaspecaj kaj similaj artikoloj. Dankojn kaj salutojn Włodzimierz Zytyński *Delegito de UEA, Kraków — str. Mogilska 20 m. 7*

*

László Novák, Alesd, *Elek Kallós*, Tg. Mures, *Irén Magyari*, Fintinele, Rumanio. — Vi skribas: »Ni estas legantoj de via multmerita revuo, kiun ni ĉiam kun granda intereso legas . . . Ni deziras al vi pluan sukcesan laboron . . .« Vian leteron ni dankas, kaj ni tre ĝojus, se inter Viaj konatoj kaj amikoj Vi kolektus legantojn similajn kiel Vi por Hungara Vivo.

Al s-anino Ida *Lisičnik*, Kutaisi, Sovetunio. — Kiel aldonon al Via afabla letero ni ricevis la numeron de 11.3.69. de la vialanda ĵurnalo „La junularo de Kartvelio". Ni gratulas Vin pro la artikolo aperigita de Vi en tiu numero sub la titolo „La ponto super la lingva oceano" kaj subtitolo „La historio de la traduko de la 'Kavaliro en tigra felo' en hungaran lingvon". Aparte ni dankas al Via E-lernantino, s-anino Anna Kŝondzer la kunsenditan kompletan E-an tradukon de la ruslingva artikolo.

Tiu artikolo pritraktas la artikolon „La mirakla forto de la nobla homa kreopotenco" aperintan en la n-ro 2/1967 de Hungara Vivo. Ĝi ĉerpas el la esperantlingva artikolo kaj kompletigas ĝin per materialo pri s-ano Georgo Ciklauri, la kartvela esp-isto, kun kies helpo — pere de E. kiel pontolingvo — Béla Vikár (same esp-isto) verkis en 1912 la majstran hungarlingvan versan tradukon de la ĉ. 800-jara majstroverko de la iama kartvela poeto Ŝota Rustaveli.

Apartan aktualecon havas tiuj ĉi linioj pro tio, ke ĵus pasis la 110a datreveno de la naskiĝo de Béla Vikár, la hungara akademiano, folkloristo, poeto kaj beletra tradukisto, al kies nomo ligiĝas krom la hungarigo de la supra kartvela klasikaĵo, ankaŭ la kompleta traduko de la finna Kalevala en la hungaran lingvon.

Kore ni dankas Viajn salutajn vortojn kaj precipe Viajn bondezirojn okaze de la 50-jara jubileo de la Hungara Konsilia Respubliko.

La ĵurnalon kune kun la traduko ni transdonis al la Hungarlanda Esperanto-Muzeo en Szeged.

*

L. Borsody, *GYŐR*, Hungario. — La diskuton pri »La Tragedio de l'Homo« sur niaj paĝoj ni jam fermis, tial — bedaŭrinde — jam ne estas ebleco aperigi Vian mallongan alparolon al tiu temo.

*

Teodoro Kulagin, MOSKVO G-309. Filovskaja ul. d. 23. — Viajn gratulajn liniojn kaj la ĉemetitan informan skribaĵon ni dankas. Ni bedaŭras, ke la mallongajn raportojn ni ne povas publikigi, sed ankaŭ en la nuna n-ro de nia revuo Vi povas trovi tiajn skribaĵojn, kiuj referas pri la eldonaĵoj kaj rezultoj de la esperantistoj en Sovetunio.

*

Damjan Vahen-Svetinov, Kapele ĉe Brezice, Jugoslavio. — Ni dankas Vian leteron kaj la foton pri Julio Baghy. Kiel niaj eksterlandaj amikoj povas aboni Hungaran Vivon, pri tio aparte ni skribis en nia antaŭa numero. Se Vi sisteme legas nian revuon, Vi povas vidi, pri kiaj niaj publikaĵoj ni akceptas volonte alparolojn aŭ kompletigojn. Kaj krome: interesajn sciigojn, altnivelajn, mallongajn skribaĵojn ĉiam kun ĝojo ni p.blikigas,; se la temo iamaniere koncernas Esperanton, precipe niajn nunajn problemojn kaj farendojn.

El la 1-a numero (1970) de Hungara vivo

B. Abody: Vivosavo. Novelo.
O. Honĉar: Danuba etudo.
Sz. Bálint: Tiel komencigis. Novelo.
V. Benczik: Morto de Samek. Novelo.
L. Feleki: Famaj homoj.
L. Gyurko: Lenin, oktobro. Fragmentoj el la libro.
Nuntempa hungara poezio: *L. Hollós Korvin, J, Pilinszky, G. Rudnai.*
K. Kalocsay: Poemoj.
L. Tárkony: Poemoj.
Grafikartisto: *Adam Würtz.*
Ada Csiszár: Nur por virinoj.
K. Kalocsay: La plej belaj vortoj.
G. Vigh: Zorgoj en Hungario
Interjuo kun L. Kökény
Domfabriko.
Recenzo, Nia humuro. Leterkesto.

Korespondi deziras

L. *Kökény*, BUDAPEST VIII., Rákóczi út 27/a, volonte reprenas kun siaj amikoj la korespondadon, interrompitan pro la multegaj E-laboroj. Cetere li petas la pluan fortan subtenadon de Hungara Vivo.

F-ino Halina *Flak* (17 jara), ul. Gdanska 32/6, WROCLAW 29, Pollando, dez. kor. pri turismo, klasika kaj ,,beat'' muzikoj kun ĉ. l. Kolektas BK.

S-ro Walter *Nitschke*, 9112 BURGSÄDT,Karl-Marx-Str. 51. DDR. dez. kor. kun. ĉ. l. pri div. t., int. fotojn, BK, PM ktp.

S-ro Stanislao *Zajac*, KATOWICE—14, ul. Korczaka 53/30, Pollando, 20-jara oficisto dez. kor. pri muziko, historio, junularaj problemoj, kol. BK. kaj diskojn kun distra junulara muziko.

F-ino Regina *Rasmus* (19-jara lernantino), WIELKI KOMÓRSK, pow. Swiecie n/w, woj. Bydgoszcz, Pollando, dez. kor pri muziko, filmarto, fotoarto, fremdaj lingvoj, junularaj problemoj, sporto, turismo. Kol. PM, BK, fotoalbumojn, diskojn kun popola, serioza kaj distra muziko kaj dancmuziko.

S-ro Marek *Trzcinski* (20-jara teknikisto), WARSZAWA, Novolipielza m. 21. Pollando. dez. kor. pri muziko, literaturo, filmarto, geografio, fotoarto, junularaj problemoj, ĉiutaga vivo en via lando, turismo, sporto. Kol. PM, BK, diskojn kun distra muziko k. dancmuziko.

GLOSARO

aŭstera: frostkonduta, frostetosa;
bienalo: aranĝajo kultura ripetiĝanta ĉiun duan jaron;
bohemo: artisto, verkisto aŭ simila, fantazie vivanta en gaje portata mizero;
delico: delikata plezuro;
ekshibiciismo: inklino pli-malpli nenormala montri sin nude korpe aŭ anime;
ekzistencialismo = ekzistadismo: konata filozofia tendenco;
gobleno (goblino, gobeleno, gobelino): speco de brodita tapiŝo aplikata precipe sur muro;
kolonialismo: strebado akiri koloniojn por ilin ekspluati;
orientalisto: scienculo okupiĝanta pri la kulturo kaj precipe lingvo de la orientaj popoloj;
pita: malgrand (aĉ) a;
pulovro = pulovero;
revizionismo: strebado revizii la fundamentajn tezojn de marksismo, por senigi la laboristan movadon je ĝia revolucia forto;
torporo = sensentiĝo de certaj korpopartoj pro nervopremo, sekve de malbona kuŝo aŭ de ligado per ŝnuro;
vori: manĝegi avide, ŝirmanĝi.

ABONO DE HUNGARA VIVO EN EKSTERLANDO

Peranto al eksterlando: KULTURA Budapest, 62, P. O. Box 149. — Sumoj de abonprezo por unu jaro en pluraj ĉefaj valutoj: Usonaj dolaroj = 2,—; sterlingaj funtoj = 0—16—6; francaj frankoj = 10,—; okc. germanaj markoj = 8,—.

Perantaj firmoj en la diversaj landoj:

AŬSTRIO: Globus (VAZ), Höchstädtplatz 3, A—1200, WIEN I. Rudolf Novák Gmbh., Köllnerhofgasse 4, A—1011, WIEN I.

AŬSTRALIO: Cosmos Bookshop, 133 Ackland Street, ST. KILDA Vic. A. Keesing, 168—174 Day Street, SYDNEY, N. S. W. 2000

BELGIO: Agence Messagerie de la Presse, Rue du Persil 14—22, BRUXELLES

BRAZILO: Livraria Brody Ltd., Caixa Postal 6366, SAO PAULO. Livraria D. Landy Rua 7 de Abril, Caixa Postal 7943, SAO PAULO

BRITIO: Collet's Holdings Ltd., Denington Estate, London Road, WELLINGBOROUGH.
The Danubia Book Co., 78 Shaftesbury Avenue, LONDON W. 1.

BULGARIO: Direkzia R. E. P. 11 Pl. Slawejkov SOFIA

ČEĤOSLOVAKIO: P. N. S. — dovoz tisku, Vinohradska 46, PRAHA 2. P. N. S. — dovoz tisku Leningradska 14, BRATISLAVA

ĈINIO: Watwen Shudian, P. O. B. Nr. 88. PEKING

DANLANDO: Hunnia Books and Music Langemosevej 37, BAGSVAERD.
Ejnar Munksgaard Prags Boulevard 47, COPENHAGEN/S.

FINNLANDO: Akateeminen, Kirjakauppa, Keskuskatu 2, HELSINKI

FRANCIO: Agence Littéraire et Artistique Parisienne 7 Rue Debelleyme, PARIS 3. Société Balaton 12 Rue de la Grande Batelière, PARIS 9.

GERMANA DEMOKRATIA RESPUBLIKO: Zeitungsvertriebsamt, Fruchtstrasse 3—4, 1004, BERLIN

GERMANA FEDERACIA RESPUBLIKO: Újváry-Griff Titurel strasse 2, 8 MÜNCHEN 81. Kubon und Sagner, Schliessfach 68, 8 MÜNCHEN 34. Kunst und Wissen, Postfach 46, Wilhelmstrasse 4, 7 STUTTGART 1. W. E. Saarbach, Follerstrasse 2, 5 KÖLN 1.

ISRAELO: Hadash, R. Nesz Ciona 4, TEL-AVIV Lepac Ltd., 15 Rambam, TEL-AVIV Gondos Sándor, Herzl 16, Bét Hakranot, HAIFA A. Fischer, R. Strauss 3, JERUSALEM

ITALIO: Avv. Andrei Lazar, Via Monte delle Gioie 24, ROMA S. Co. Lib. Ri., Piazza 33, ROMA

JAPANIO: Nauka Ltd., 30—19, Minami-Ikebakukuro 2-chome, Toshima-ku, TOKYO

JUGOSLAVIO: Forum, Vojvode Misica broj 1, NOVI-SAD Jugoslovenska Knjiga, Terazije 27, BEOGRAD

KANADO: Délibáb Film and Record Studio, 19 Prince Arthur Street West, MONTREAL 18. Que. Pannonia Books, 2 Spadina Road, TORONTO 4, Ont.

KOREO: „Chul Bo" PHENJAN

NEDERLANDO: Swets et Zeitlinger, Keizersgracht 487, AMSTERDAM C.

NORVEGIO: A/S Narvesens Litteratur Tjenste P. O. Box 6140 Etterstad, OSLO

POLLANDO: P. K. W. Z. Ruch, ul. Wronia 23, WARSZAWA

RUMANIO: OSEP, Gara de Nord, BUCURESTI OSEP, ORADEA

SOVETUNIO: Sojuzpechatj. Import, Prospekt Mira 112—a MOSKVA

SVEDIO: A. B. Nordiska Bokhandeln, Drottninggatan 7—9, 110 10 STOCKHOLM 1. A. B. Sandbergs Bokhandeln, Sturegatan 8, 114 37 STOCKHOLM 5.

SVISIO: AZED AG., Dornacherstrasse 60/62, BASEL 4200. Metropolitan Verlag, Binningerstrasse 55, ALLSCHWILL

USONO: Center of Hungarian Litterature Inc., 1538 Scond Ave., NEW YORK 10028. Corvin Travel and Gift Parcel Service, 1590 Second Ave., NEW YORK 10028. Hungarian Books and Records 11802 Buckeye Road, CLEVELAND, Ohio 44120

VENEZUELO: Luis Tarcsay, Calle Iglesia Ed. Villoria Apt. 21—105, C. 24. CARACAS

VJETNAMO: Phong Phat Hanh Bao Chi 17, Dinh Le. HANOI

Hungaroj abonu por eksterlandanoj laŭ la avizo sur la 1-a paĝo!

KRUCENIGMO



1. Japana poeto esperantista. 8. Prepozicio. 9. Senfina utila agado. 10. Adamo estis la unua. 12. Bona al iu. 14. Denove. 15. Du oroj(!). 16. Esperanta societo de insulanoo. 18. Al preninte 2. konsonantojn iĝas nenormale malgranda. 19. Eco de bona tranĉilo. 21. Vinberar' neologisme. 23. Konjunkcio. 25. La faro laŭ 5., sed la tria litero forŝtelita. 26. Skulptisto, gravuristo faras retro. 28. Senvokale duba. 29. Interjekcio. 30. Similul; sozi'. 32. Malgranda. 34. Tio helpas atingi celon eĉ sen 35., kiu mankas ankaŭ ĉe 30.—36. Muzika ensemblo. 1. Dana redaktisto, poeto de naturscienco. 2. Merite. 3. Instrumento. 4. Duona maro. 5. Ŝtelu perforte. 6. Eŭropa ĉefurbo. 7. En opero la heroo kantas belan .. 11. Trairu la straton sur tiu besto! 13. Kornoj kaj kronoj sen oj. (!) 17. Esperanta antologio. 20. La unua stilisto esperantista (1872—1959). 21. Rapika uzo. 22. Percepti la bildojn de objektoj. 24. Granda poeto esperantista. 26. Eli ol nenio. 27. Laŭta demandosigno plus pronomo. 29. Kalvulo apenaŭ havas ĝin eĉ sen o, 31. Nia plej granda organizajo. 33. Nur kun vokaloj ĝi estas tuta. 34. La duono de urbo 5.

Gábor Vigh

W. E. COLLINSON LA MONDFAMA LINGVISTO MORTIS

80 jara Per lia forpaso Esperanto perdis unu el la sciencul-pioniroj, plej multe pledantaj por la int. lingvo en sciencaj rondoj jam en la unuaj jardekoj de E. Li naskiĝis en 1889, doktoriĝis en Heidelberg kaj iĝis univ. profesoro de germana lingvo en Liverpool, kie li estis ankaŭ lektoro de E. Tiutempe ankoraŭ malmultaj el la konataj lingvistoj rigardis serioza la aferon de int. lingvo, do estis grave, ke oni povis invoki lin, kiu ne nur taksis ebla la solvon. sed elektis inter la multaj eblaĵoj E-on. Li partoprenis (1924) en la laboro de IALA, ĝis tiu deflankiĝis de E-o. , estis prez. aŭ viceprez. de diversaj gravaj E-institucioj, kiel L. K., Akademio, ISAE, ktp. Krom nacilingvaj verkoj estas grava lia E-lingva „La homa lingvo" (1926), kaj espereble ne perdiĝos, sed trovos eldonistonlia manuskripto „Civilizo kaj lingvo".

MORTIS MÁRTA NÁDASDI

la 12-an de oktobro. Ŝi jam ne povis legi sian artikolon, aperintan en nia 3-a n-ro: „Kiamaniere redonis la vivemon Esperanto?" Kara „Kokcinelo"—kiel oni nomis Vin en la iama Esperanta Rondo Amika, ni adiaŭas de Vi kun doloro kaj kunsento al la funebranta familio.

Nova vojo por la junigo de Esperantujo

Se iu trafoliumas la adresaron de iu ajn Esperanta renkontiĝo, kunveno aŭ kongreso, estas tre okulfrapa la fakto, ke la partoprenantoj de la menciitaj esperantistaj kunvenoj estas mezaĝaj aŭ eble pli maljunaj. La kialon mi ne intencas klarigi, sed la indikoj de la statistiko montras tiun fakton. La hungarlanda movado ĉiujare pli forte sentas la mankon de la junaj fortoj. Sed leviĝas la demando: kion ni faris sur tiu tereno? Nuntempe, kiam la vivo prezentas al la junuloj tiom da amuzeblecoj, la spirito de esperantismo devigas nin serĉi kaj trovi la rimedojn, kiuj donas al la junuloj allogan, interesan eblon renkontiĝi uzante la internacian lingvon, nc tro malpezigante la monujon gepatran, Laŭ mi, la hodiaŭajn junulojn interesas tia Esperanto, kiu servas ilin, kaj ne estas nur por si mem.

Tiaj pensoj gvidis la Békés-departementan Esperanto-Komitaton decidante aranĝi veran landan studkonkurson Esperantan por la junuloj. La penson de la Landa Esperanto-studkonkurso decidis subteni la Instrua Komitato de la Hungara Esperanto-Asocio, kaj la rezulto estis, ke en la urbo Gyula okazis la I-a Esperanto-studkonkurso.

La landan studkonkurson antaŭis la departementaj studkonkursoj. Dum la departementaj studkonkursoj elektiĝis po tri gejunuloj, kiuj prezentis sin kiel la plej lertaj en Esperanto. Ĉi tiuj junuloj veturis al Gyula. Kunvenis 24 gejunuloj el ses departementoj. La konkurso okazis en du grupoj. Al la unua apartenis la baz-lernejanoj (10—14 jaraj), al la dua la mezlernejanoj (15—18 jaraj). Tiuj, kiuj ne lernas en gimnazio aŭ alia mezgrada lernejo, povis partopreni en tiu grupo, kiun ilia scio montris. Kiuj konkursis en la unua grupo, devis scii la studmaterialon de 11 lecionoj el la lernolibro Esperanto 1, (verkita de Stefano Szerdahelyi) kaj la partoprenantoj en la dua grupo maksimume 24 lecionojn el la Baghy-a lernolibro.

Kiuj estis komencantoj, tiuj konkursis nur el 11 lecionoj.

Kiajn taskojn ricevis la konkursantoj? = 1-e: lego — traduko, 2-e: respondi je gramatikaj demandoj, 3-e: paroli pri instrua bildo, 4-e: pri donita temo, (familio, hejmo), 5-e: pri movadhistorio. Pri ĉi lasta la sperto montris, ke ankaŭ la malnovaj esperantistoj ne bone konas la movadhistorion, precipe tiuj, kiuj ne lernis por atingi la atestilon de ekzameno »B«. Sen kono de la pasinteco ne eblas vera kono de la nuno.

Ne gravas nun por la legantoj la rezulto de la studkonkurso. Tamen ni menciu, ke la junaj esperantistoj bone regas la lingvon. Staris ekzemple knabino antaŭ la ekzamenna komitato, kiu Esperante difinis la gramatikaĵojn. Estis tre interesa, ke la plej junaj konkursantoj pli flue parolis en Esperanto ol la gimnazianoj.

Videbliĝis, kiel grave estas komenci la lernadon jam en la baza lernejo. Tiuj, kiuj jam alkutimiĝis al la parolo en Esperanto, pli facile alproprigas al si la studmaterialon por la progresantoj. Ne sufiĉas komenci Esperanton nur en la mezlernejo, — se eble, oni komencu ĝin jam en la bazlernejo. La konigo de la rezultoj okazis antaŭ la internacia aŭskultantaro de la 7-a Somera Esperanto-Universitato. La partoprenintoj de la studkonkurso havis do okazon senti iom da Esperantujo. *Zsolt Gyarmati*

medimpex

Hungara Eksterlandkomerca Entrepreno
pri Farmaciaj Produktaĵoj

Budapest, 5. • Poŝtkesto 126

EKSPORTAS-IMPORTAS

Farmaciaj specialaĵoj • Farmaciaj bazmaterialoj • Vakcinaĵoj por hom- kaj best-terapeŭtikaj celoj • Veterinaraj drogoj • Furaĝaldonaĵoj • Laboratoriaj kemiaĵoj • Biokemiaj produktaĵoj • Radioaktivaj produktaĵoj • Volatilaj oleoj • Kuracplantoj • Resanigaj kaj amaraj akvoj

90-jara esta

LA UZINO DE ELEKTRA APARATOJ GAN

La produktaĵojn de tiu mondfama fabri
al 60 landoj eksportas

La Hungara Eksterland-komerca
Entrepreno de Elektraj Aparatoj

TRANSELEKTRO

Budapest V., Münnich F. u. 13. POB. 377.
Telefono: 120—790